ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 4 Januaro-Februaro 1984.

! Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad) !

! de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Montoyerstrato 37 b24 !
B-1040 BRUSELO !
! Postĉekkonto 000/0163434.86 Tel. (02) 513 59 35 !

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraro de B.E.F., F.E.L. kaj A.P.E., ankaŭ de lokaj grupoj prizorgu la materialon por la bulteno.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj !

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

BEF - ESTRARO

| | |
|---|---|
| Prezidanto | : Marc DEMONTY (Bruselo) |
| Vicprezidantoj | : Lambertine DREZE (Liego) |
| | : Edward SYMOENS (Kalmthout) |
| Sekretarioj | : André MERTENS GOOSSENS (Bruselo) |
| | Jan BOVENDEERD (Mortsel) |
| | Clément THOLET (Liego) |
| Kasisto | : Jules VERSTRAETEN (Antverpeno) |

****************************************

UNIVERSALA ESPERANTO-KONGRESO en Vankuvero

Petu kaj resendu aliĝilojn, pagu kotizojn al oficiala peranto BEF

La landa asocio ne organizas grupan vojaĝon. UEA aranĝos flugojn!

****************************************

LANDA CENTRO DE DOKUMENTADO PRI ESPERANTAĴOJ

La sekretario de Belga Esperanto-Federacio proponas arigi ĉiujn publikigaĵojn de belgaj Esperanto-organizoj, t.e. revuojn, bultenojn, periodaĵojn, dosierojn, informilojn, librojn, broŝurojn, studaĵojn, dokumentarojn kaj ĝenerale eldonaĵojn.
Tiel la landa asocio povus mem dokumenti demandantojn, kiel internaciaj aŭ alilandaj organizoj, landaj publikaj instancoj, bibliotekoj, eldonejoj, k.t.p.; sekve ĝi povus pli konkrete konigi la agadojn de la Esperanto-asocioj en Belgio.
Ĝis nun respondeculoj de pluraj publikaj kulturaj kaj edukaj dokumentaroj jam petis al la landa asocio regule sendi tiajn eldonaĵojn de la movado; kaj BEF disponas nur sian bultenon kaj sian organigramon por dokumenti oficialajn instancojn. Dokumentaro kun multaj esperant- kaj nacilingvaj eldonaĵoj de la enlandaj asocioj estus, i.a. pro sia diverseco, certe pli konvinka por propagandi la Esperanto-movadon. Se asocioj, grupoj kaj eldonistoj konsentas kun tiu utileco, ili estonte bonvolu sendi ĉiujn siajn eldonaĵojn plurope al la sekretariejo de BEF: se eblas, po 5 ekzemplerojn.
Probablas ke tia informado estos profitiga por la asocioj !

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$
Nekredeble! Ĉu iu ankoraŭ ne pagis siajn jarkotizojn kaj abonojn ?
$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

Eŭropa Klubo - Flandra Sekcio

Estraro 1983 -1985

Wim De Smet, Philip Van Stevens, Herman Van Eyndt, Erhard Boehme, Grégoire Maertens, Edward Symoens.
Mandato de vicprezidanto estas disponebla.

IV-a Porpaca Kunveno de Geesperantistoj

okazos en Pardubice, 100 km oriente de Praha, 23-25.3.1984.
Anonco de Ceĥa Esperanto-Asocio. Informilo havebla ĉe BEF.

Komunikaĵo

Radio Esperanto celas informi la loĝantojn de la pariza regiono pri la Esperantista movado kaj poresperante propagandi..., ricevis de la franca ŝtato malpermeson elsendi...
Subtenita ne nur de la aŭskultantaro sed ankaŭ de diversaj regionoj en la mondo, ĝi daŭrigas la disaŭdigàn malgraŭ tiu malpermeso. Bonvolu sendi peticiojn, subtenajn leterojn kaj helpon al Radio Esperanto, 145 Rue Amelot, F-75011 Parizo

RADIO POLONIA

Ekskursoj tra Pollando,
valoraj objektaj premioj
estas gajneblaj de la aŭskultantoj.
Program-informilo: RADIO POLONIA, E-Redakcio, Varsovio, Pollando.



* ESPERANTO-KULTURDOMO *
Grésillon - Baugé (Francio)

sendis al BEF sian programon de Kulturaj Aranĝoj 1984:
-Internacia Renkonto de Infanoj: 1 - 7 aprilo.
-Prelegoj kaj kursoj: 1 - 22 julio.
-Kursoj: 22 julio - 5 aŭgusto.
-Esperanto per slojdo: 5 - 19 aŭgusto.
-Renkonto de blindaj kaj ne-blindaj Esperantistoj: 19 aŭgusto - 2 septembro.
Informilo havebla ĉe BEF.

69-a Universala Kongreso de Esperanto
de la 21-a ĝis la 28-a de julio 1984
en Vankuvero, Kanado.

Bonvolu (peti kaj) resendi la aliĝilon kaj fari la pagon al via landa peranto, kiu por Belgio estas la Belga Esperanto-Federacio, Montoyerstrato 37 b.24 B-1040 Bruselo, pĉk 000/0163434.86.

Laŭ nuna kurzo de Guldeno ĉe la plimultaj bankoj en Belgio (18,57 BF.), ni indikas ĉisube la kongreskotizojn en nia nacia mono:

| Kongreskotizoj ĝis la dato: | 14.05.84 | poste |
|---|---|---|
| 1. Ne individua membro de UEA | 3900 BF | 4550 BF |
| 2. Individua membro de UEA | 3250 BF | 2900 BF |
| 3. Kunulo/junulo/handikapulo -ne individua membro de UEA | 2600 BF | 1950 BF |
| 4. Kunulo/junulo/handikapulo individua membro de UEA | 1950 BF | 2600 BF |

La kurzo ĉe ASLK/CGER estas meze pli avantaĝa...
Krome kurzoj de valutoj daŭre ŝanĝiĝas!
Do la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aŭ malgajnoj por la peranto (se ili ne tre altiĝos).
Tamen por malgrandigi la riskojn por la peranto, <u>la aliĝontoj povas pagi rondan sumon aŭ aldoni donacon por la Federacio.</u>
Anticipan dankon!
Vi trovos ankaŭ ekzempleron de aliĝilo en la bulteno.
A. MG.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$
$$ $$
$$ Aliĝu pere de BEF = subtenu la landan Esperanto-movadon ! $$
$$ $$
$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

## ESPERANTO-GRUPO EN LA EŬROPA PARLAMENTO

En Oktobro 1982 estas fondita Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo en Strasburgo kun la celo regule informi la Eŭropajn Parlamentanojn pri la progreso de Esperanto kaj esplori la eblecojn uzi la Internacian Lingvon por solvi la lingvajn problemojn ne nur de la Parlamento sed ankaŭ de la Eŭropa Komunumo ĝenerale.

Dr. Gordon Adams UK/Lab
Richard Balfe UK/Lab
Beata Brookes UK/Con
Marisa Cinciari-Rodano I/PCI
Ken Collins UK/Lab
Ernest Glinne B/PS
Paul Howell UK/Con
Christopher M. Jackson UK/Con
Brian M. Key UK/Lab
Alfred Lomas UK/Lab
Thomas J. Maher IRL/IND
Pol Marck B/CVP-EVP
John Marshall UK/Con
Tom Megahy UK/Lab
Giorgio Mondino I/
Ben Patterson UK/Con
James Provan UK/Con
Dieter Rogalla D/SPD
Barry Seal UK/Lab
Hans-Joachim Seeler D/SPD
Sir James Scott-Hopkins UK/Con
Madron Seligman UK/Con
Amedee Turner UK/Con
Alan Tyrrell UK/Con
Willem Vergeer NL/CDA

El "ESPERANTO kaj PARLAMENTO".

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

## 52-a INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj organizas la 52-an IKBE en la kadro de "ITALUJO: KULTURO KAJ NATURO" de la 21-a ĝis la 30-a de junio 1984 en Tirrenia (Pisa). Informilo havebla ĉe BEF.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

## NACIAJ KAJ INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

1984

| | |
|---|---|
| 19.02 | Solena Malfermo de la Semajno de Internacia Amikeco - Leuven B - Prelegoj, filmo... |
| 24-26.02 | Semajno de Internacia Amikeco - Pécs H - Studvojaĝo |
| 04.03-16.12 | Konstanta Internacia Esperanto-Lernejo - Bydgoszcz PL Kursoj, prelegoj, studvojaĝo |
| 17-18.03 | Kadrokurso pri Turismo - Gento B |
| 01-07.04 | Infankunveno en Kultura Centro Grésillon, Baugé F Edukaj kaj klerigaj aktivecoj |
| 06-08.04 | 62-a Germana Esperanto-Kongreso - Kassel D |
| 13-15.04 | 2-a Internacia Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj - Zielona Góra PL |
| 20-23.04 | 4-a Internacia Literatura Forumo - Ĝenevo CH |
| 24-28.04 | Simpozio "Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo" - Varsovio PL - Prelegoj |
| 27.04-01.05 | 12-a Scienca Interlingvistika Simpozio - Varsovio PL |
| 28-29.04 | 1-a Internacia Renkontiĝo de Komencantoj en Esperanto RelaXhoris - Ferrières B - Prelegoj, spektakloj, ludoj, dancoj, teatraĵo, lumbildoj, kantoj, diversaĵoj ... |

---

## Deziras korespondi...

Mezaĝa instruistino kiu partoprenis la 68-an U. K. d. k. kun belgaj geviroj ; lernas Esperanton ekde 1982; interesas literaturo, historio kaj ĉiutagaj aĵoj.
Marcella Kovàcs, Bakonszeg, Deák F u 2, H4164 Hungario.p

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 4 Marto-Aprilo 1984.

! Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad) !
! de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Montoyerstrato 37 b24 !
B-1040 BRUSELO
! Postĉekkonto 000/0163434.86 Tel. (02) 513 59 95 !

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraroj de B.E.F., F.E.L. kaj A.P.E., ankaŭ de lokaj grupoj prizorgu la materialon por la bulteno.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj !

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

## BEF - ESTRARO

| | |
|---|---|
| Prezidanto | : Marc DEMONTY (Bruselo) |
| Vicprezidantoj | : Lambertine DREZE (Lieĝo) |
| | : Edward SYMOENS (Kalmthout) |
| Sekretarioj | : André MERTENS GOOSSENS (Bruselo) |
| | Jan BOVENDEERD (Mortsel) |
| | Clément THOLET (Lieĝo) |
| Kasisto | : Jules VERSTRAETEN (Antverpeno) |

### KLUBO 100

arangos la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto"
Kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn! Kotizo minimuma 1000 BF rajtigas voĉdonon en ĉiu kunveno de la klubo, kaj ankaŭ...
!!! partoprenon al lotumado de senpaga vojaĝo al Varsovio !!!
Sendu viajn pagojn al Bankkonto 034.0379435.33 de KLUBO 100

**Generala jarkunveno de BELGA ESPERANTO-FEDERACIO.**

La jarkunveno de BEF okazis je sabato la 22-a de oktobro 1983 en CHARLEROI.

Estrarkunsido komencas je 9 h. 30 en la KULTURDOMO.

Ceestas: Marc DEMONTY, Lambertine DREZE, André MERTENS GOOSSENS, Jan BOVENDEERD, Clément THOLET, Jules VERSTRAETEN, Andrée ORSOLINI, Marcus DELFORGE, Simonne FICHEFET, José STARCK.
Sin senkulpigis: Edward Symoens, André Staes, Roger Destabelle.

AMG prezentas la protokolon de la antaŭa kunsido. MD konstatas la aprobon de la raporto.
MD, AMG, JB, JV, AO pridiskutas la destinon kiun BEF donos al la rentumo de la fondusoj Jaumotte-Loquet kaj Jennen-Debrouwere. JB rimarkigas ke la kapitalo de la dua fonduso ekde 1978 atingas 20000 BF. Post demando de AO, MD klarigas ke Germain Pirlot ĝis nun ne ricevis la sumon kiun BEF al li dediĉis por la antaŭa jaro. JV reguligos...
Post longa, kvazaŭ ĝenerala, diskuto pri la disdivido de la subvencioj kaj la fiksado de la kotizoj, i. a. de la Brusela Grupo, JB proponas prokrasti la decidpn pri la destino de la rentumo de Fondusoj ĝis la pridiskuto de la buĝeto. Konsentite !
MD invitas la kasiston JV prezenti la financan jarraporton.
JV klarigas la "realan" situacion kaj la sistemon de la subvencioj: la ŝtato certe subvencias la lukostojn, la salajrojn, la sekretariajn kostojn (telefonon, poŝtmarkojn, materialon... ), la vojaĝelspezojn, la asekuradon; li supozas ke oni ankaŭ subvencius la propagandon, manifestaciojn, kongresojn, renkontiĝojn, kaj la dokumentadon (?)... Aliaj enspezoj estas la donacoj; MD atentigas la estraron ke ankaŭ la personaj elspezoj de respondeculoj kiuj ne sendas kostnotojn devus esti enkalkulitaj en donacoj: AMG rimarkigas ke li persone elspezis 200 000 BF por aĉeto de komputilo, presilo,
kaj programoj kiujn li uzas ĉefe por sia laboro en la Esperanto-movado.
MD revenas al la destino de la Fondusoj kaj oni proponas dediĉi la rentumon al propagandaj celoj de BEF.
Poste okazas diskuto inter JB ,MD ,AMG, LD, AO, CT... pri la eldonado de la bulteno "Esperanto en Belgio".

Generala Kunsido okazas posttagmeze en la URBODOMO de Charleroi.

Ceestas: Marc DEMONTY, Lambertine DREZE, André MERTENS GOOSSENS, Clément THOLET, Jan BOVENDEERD, Jules VERSTRAETEN, Andrée ORSOLINI, Grégoire MAERTENS, Henri LENTZEN, Monique VEREECKEN, Roger DE SCHEPPER, José STARCK, Simonne FICHEFET, Georges LEPAGE, Robert DE KEGEL.
Sin senkulpigis: Lucien De Sutter, Louis Peeters.

1. Enkonduka parolado de S-ro G. Maertens, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio:
"Perspektivoj por Esperanto en Eŭropaj Instancoj".
GM donas interesajn klarigojn pri la agado de la Esperanto-organizoj en la Eŭropa Komisiono: La jaro 1983 estis ŝlosila periodo por la propagando pri Esperanto en ties medioj. Dank'al la laboro de Eŭropa Esperanto-Centro okazis sukcesaj kursoj por Eŭropaj funkciuloj kaj kunvenoj de funkciuloj kaj Parlamentanoj favoraj al nia lingvo. Tian agadon oni devas daŭrigi !

2. Tagordo de la ĝenerala kunsido:
2.1. Aprobo de la protokolo de la antaŭa ĝenerala kunveno :

AMG legas la protokolon. MD konstatas la silentan aprobon de la kunsidantaro.

2.2. Raportoj de la belgaj Esperanto-organizoj:
2.2.1. Flandra Esperanto-Ligo :

JB prezentas la raporton de FEL. Poste okazas diskuto inter JB, MD, AMG, LD, AO ..; JB klarigas pli detale la organizon de rapidkursoj.

2.2.2. Asocio por Esperanto

LD prezentas la raporton de APE, kaj promesas sendi kopion al la sekretario de BEF...

2.2.3. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

MD mem prezentas la raporton kaj tiun pri la kadrokursoj.

2.3. Sekretaria raporto de Belga Esperanto-Federacio :

AMG mencias la ĉefajn aktivecojn de BEF: jarkunveno en Antverpeno, partopreno al Universala Kongreso en Antverpeno, al Junulara Kongreso en Leuven, al IFEF-Kongreso en Oostende, al Trilanda Renkontiĝo en Düren, al Trilanda Renkontiĝo en Verviers, al Eŭropa Festivalo "La Mondo kiun ni elektas" en Bruselo, ĉeesto al la funebro de nia honora vicprezidanto Charles Poupeye, partopreno al renkontiĝoj en la Eŭropa Komisiono en Bruselo kaj la Eŭropa Parlamento en Strasburgo, aranĝo de kadrokursoj, kaj dumonata eldonado de la bulteno "Esperanto en Belgio".

2.4. Raporto de Eldonejo- Librejo Sonorilo :

MV prezentas financan raporton de Sonorilo.
GM rimarkigas ke la buĝeto de la asocio bezonas ankoraŭ la konsenton de ĝia administrantaro.

2.5. Financa raporto de Belga Esperanto-Federacio :

JV prezentas bilancon (kun deficito) kaj novan buĝeton. Li klarigas ankaŭ la subvenciajn kaj impostajn sekvojn de la disdivido de la elspezoj.
GM proponas akcepti la buĝeton, tamen la financa komisiono estu komisiita por ŝanĝi la ciferojn de la enspezoj por libroj kaj donacoj, kaj tiujn de la elspezoj por publikaĵoj kaj studbiblioteko, tiel ke
la sumoj de salajroj povus malpliiĝi (de 125000 F). Krome por la subvencioj estus ĉiam preferinde prezenti pli da elspezoj por kulturaj aferoj anstataŭ administraj aŭ mastrumaj !
Okazas ankaŭ diskuto inter GM, AO, LD, RD, JS, JV ... pri la fakturoj de la Grafika Centro. GM atentigas ke la prezoj estas normalaj (ne-esperantistaj klientoj uzas ankaŭ la GC), tamen ili enhavas profiton por la Esperanto-movado. Li do opinias "plej bone" ke la asocioj mendus la presadon de esperantaĵoj al la G.C.

2.6. Propono de nova UEA-delegito, anstataŭonto de Ch. Poupeye

FEL proponas unu kandidaton: S-ro Fernand ROOSE el Brugo.
La prezidanto de BEF konstatas la aprobon de la Landa Asocio.
La ĉefdelegito AO konsentas.

2.7. Estonta Agado
2.7.1. Kadro-kursoj
2.7.2. Preparo de la Jubilea Jaro

MD anoncas ke la estraroj de BEF, FEL kaj APE formos komisionon kiu kunvenos je la 19-a de novembro por prepari planon de agadoj por la Jubilea Jaro 1987.
Post diskuto pri la kadrokursoj, JB proponas ke BEF organizu ilin kun la kunlaboro de specialistoj de la tuta lando, eĉ de eksterlando.

2.7.3. Bulteno "Esperanto en Belgio"

Por malpliigi la kostojn de eldonado, la kunsido akceptas proponon limigi la enhavon de la bulteno ĉefe al informoj pri landaj aranĝoj; artikoloj pri eksterlandaj informoj aŭ anoncoj devus reduktiĝi al kelkaj linioj !
Konklude MD dankas la kunsidintaron.

---

NACIAJ KAJ INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

1984

| | |
|---|---|
| 28-29.04 | 1-a Internacia Renkontiĝo de Komencantoj en Esperanto RelaXhoris - Ferrières B - Prelegoj, spektakloj, ludoj, dancoj, teatraĵo, lumbildoj, kantoj, diversaĵoj ... |
| 05.05 | Trilanda Renkontiĝo - Eschweiler- Weisweiler - D Kunsido, prelego, kantoj, dancoj, muziko, ludoj... |
| 06.05 | Jarkunveno de Eŭropa Klubo - Antverpeno - B |
| 12.05 | Kunsido de Klubo 100 - Restoracio Norda stacidomo - Bruselo - B |
| 15-20.05 | Esperanto-staĝo komencantoj - La Chaux-de-Fonds - CH |
| 22-27.05 | Esperanto-staĝo progresantoj - La Chaux-de-Fonds - CH |
| 25-28.05 | 68-a Brita Kongreso de Esperanto GB |
| 31.05-03.06 | Mediteranea Konferenco de Esperantologio - Villafranca de Penedés E - Prelegoj... |
| 01-10.06 | Internacia Esperanta Ŝak-seminario - Pisanica BG Prelegoj, ekskursoj |
| 08-12.06 | 76-a Franca Kongreso de Esperanto - Bourges - F |
| 12-17.06 | Esperanto-staĝo komencantoj - La Chaux-de-Fonds - CH |
| 19-24.06 | Esperanto-staĝo progresantoj - La Chaux-de-Fonds -CH |

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

**Pri la Organigramo de BEF**

La redaktoro ricevis plurajn utilajn rimarkojn kaj informojn, ĉefe de la ĉefdelegito Andrée ORSOLINI, de la vicprezidanto Lambertine DREZE kaj de la sekretario Jan BOVENDEERD.
Li dankas ilin kaj aliajn korespondantojn; dank'al ilia helpo, li jam povis korekti la tekston por estonta eldono.

**Eldonejo-Librejo SONORILO**

La generala kunsido de la administrantaro okazis je 04.02.84.
Administranto deklaris ke Sonorilo devas akcepti ke aliaj asocioj en la lando povas fondi libroservon.
Tamen G. Maertens substrekis la specialan celon de Sonorilo: vendi librojn en tuta Belgio, ĉu al grupoj, ĉu al unuopuloj, kie ajn en Flandrio aŭ Valonio.
"Last'aperis" ne plu estu revuo, sed informilo pri libroj; krom listo de libroj ankaŭ aperos recenzoj. M. Demonty kontrolos la tekstojn.
La kunsido akordiĝis pri la re-eldono de la lernolibro de D-ro P. Denoël, "Initiation théorique et pratique".

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

**KLUBO 100**

Marc Demonty redaktis la protokolojn de la unuaj kunsidoj. Ili aperos en bulteno de BEF.
La venonta kunsido okazos sabaton la 12-an de majo en la restoracio de la Norda Stacidomo en Bruselo.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

KLUBO 100 - 1-a Listo de kotizantoj.

| | |
|---|---|
| Roland ROTSAERT | 1000. |
| Marc DEMONTY | 1000. |
| A. MERTENS GOOSSENS | 1000. |
| Jan BOVENDEERD | 1000. |
| Jules VERSTRAETEN | 1000. |
| L. DREZE | 1000. |
| SYMOENS | 1000. |
| G. MAERTENS | 1000. |
| S. DE WEERD | 1000. |
| E. DHONDT | 1000. |
| Hubert AUDENAERT | 1000. |
| M. GRELA | 1000. |
| Blanche LACROIX | 1000. |

Sumo je la fino de februaro: 13000. BF

Gratulojn al la iniciatantoj... kaj ili ne restu longtempe 13-ope por la sukceso de tiu grava agado !

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

Kongreso "La Eŭropaj Elektoj"

Antverpeno, 04.05.06 majo 1984 (v.s.d.)
Eŭropa Klubo, Pk.3, B-1040 Bruselo 26.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

RADIO POLONIA - Varsovio.
disaŭdigas en Esperanto ĉiutage...
La 4-an de aprilo 1984, oni festis la 25-jariĝon de la agado !
KORAJN GRATULOJN !

# jam kompletigita plena verkaro de zamenhof?

**Antaŭen al la laboro:** Plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 3. 1974. 344p. 22cm. Bind. Tiu ĉi kajero, laŭ sia subtitolo "Tempo de Esperantisto", koncernas la jarojn 1892-1895. Enestas postparolo, komentoj kaj indeksoj. Prezo: 780 BF.

**Hebreo el la geto; De cionismo al hilelismo:** Plena verkaro de L. L. Zamenhof, kajero 5. 1976. 455p. Kolorilus. 22cm. Bind. Dokumentoj (kaj komentarioj) pri la vivo kaj laboro de d-ro Zamenhof, ĉefe en la periodo antaŭ la apero de Esperanto; represo de la tuta broŝuro "Hilelismo" (1901). Prezo: 780 BF.

**Inkunabloj de Esperanto, La:** Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 1-bis. 1979. 283p. 22cm. Bindita. Bibliografia kaj historia studo pri la verkoj kolektitaj en "Unuaj libroj por esperantistoj", kun aparta elĉerpa komparo inter la diverslingvaj eldonoj de la "Unua libro". Prezo: 780 BF.

**Kun gradaj paŝoj eksterlanden:** Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 6. 1979. 427p. 22cm. Bindita. Verkoj, ĉefe leteroj, el la jaroj 1901-1904. Pli ol duonon de la volumo formas komentario, bibliografiaj notoj kaj fonaj dokumentoj de la sama periodo. Prezo: 780 BF.

**Ni laboru kaj esperu:** (Plena verkaro, kajero 2), L.L. Zamenhof. 1974. 324p. 21cm. Bind. Leteroj, dokumentoj, artikoloj kaj poemoj de Zamenhof el la jaroj 1887-1891. Kun postparolo, notoj, indekso kaj kronologio. Prezo: 780 BF.

**Tamen la afero progresas!** Plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 4. 1975. 414p. 22cm. Bindita. Koncernas la jarojn 1896-1900 kaj portas la subtitolon "Komenca tempo de Lingvo Internacia". Enhavas ankaŭ postparolon, notojn kaj indeksojn. Prezo: 780 BF.

Kromkajero:

Korespondaĵo ludovikologio: Interesega letersango pri Zamenhofologiaj demandoj. Prezo: 660 BF.

Mendu ĉe ELDONEJO & LIBREJO SONORILO
DOORNSTRAAT 22
B- 2610 WILRIJK (Belgio)

La sendokostoj ne estas inkluzivitaj!!
Eldonejo & Librejo Sonorilo estas kaj restas la libroservo kun la plej malaltaj sendo- kaj vendoprezoj.

---

M E N D O

Viro/Virino (forstreku la nevalidan)
Nomo (familia aŭ ĉefa, por alfabeta ordigo)..........................
Nomo (kompleta)..........................................
Kompleta poŝta adreso: nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo ĝuste lokita.............................................
Lando (en Esperanto)................ Subskribo..............
Dato............... Telefonnumero..............
Bonvolu sendi al mia adreso:
..... (kvanto) de.........................................
..... (kvanto) de.........................................
..... (kvanto) de.........................................
..... (kvanto) de.........................................
0 Bonvolu sendi fakturon.
0 Mi havas konton ĉe SONORILO, n-ro......., bv. sendi fakturon.

# EUROPA ALMANACH

**EUROPA LINGVA KALENDARO** — **FASTI EUROPENSES LINGUARUM**

Jarlibro pri la Europa Komunumo kaj ĝiaj lingvoj kun kalendaro 1984/85 (unufoja eldono por 8 landoj)

- diversmanieraj informoj en la 8 lingvoj de la Eŭropa Komunumo (Dansk, Deutsch, English, Francais, Gaelige, Ellenika, Italiano, Nederlands kaj krome en la du neutralaj lingvoj: Lingua Latina kaj Internacia Lingvo (ILo/Esperanto).
- listoj kun la membroj, frakcioj kaj partioj de la Europa Parlamento
- grafikoj kaj statistikoj pri la ekonomio kaj la komerco de la EK
- mono-tabelo kun konvertaj kurzoj
- adresoj de gravaj eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj
- mallongaj informoj pri la landoj de la EK
- internaciaj mallongigoj de la landoj kaj monoj (aŭtomobilo/poŝtkodo)
- baza vort-trezoro de la 8 EK-lingvoj kaj la du neutralaj lingvoj:
- Lingua Latina kaj la Internacia Lingvo (ILo/Esperanto)
- ebleco lerni ĉiutage novan vorton en pluraj lingvoj

**La EŬROPA ALMANAKO 1984/85 taugas por donaco kaj informbroŝuro, por ĉiu interesata ŝtatano kaj krome eŭropanoj nunaj kaj estontaj.**

Eldonistoj:

Association des Anciens Stagiaires des Communautés Europeennes, Bruxelles
ALEUS Laborrondo pri liberala eŭropa lingvo-politiko r. s., Paderborn

**Mendu ĉe:**

Hannelore Lobin, Multilingua Buchversand, Sylter Weg 11, D-4790 Paderborn
Gutenberg Buchhandlung, Vieille Halle aux Blés, B-1000 Bruxelles

**Prezo:** DM 15,– + ekspedokostoj; BFR 330,– + ekspedokostoj
(Specialaj kondiĉoj por libroservoj)

# Universala Esperanto-Asocio

en konsultaj rilatoj kun Unesko

Centra Oficejo: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. (010) 36 15 39


**Al:** Landaj Asocioj de UEA
Landaj Sekcioj de TEJO
Ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA
Fakaj Asocioj
Lokaj grupoj registritaj ĉe UEA

**Informe al:**
Estraranoj de UEA kaj TEJO
Komisiitoj pri Informado, Landa Agado kaj Financo + Administrado.

Karaj kunlaborantoj,

La fino de la nuna jaro jam proksimiĝas, kaj ni komencas turni nian atenton al la venonta.

Trovu ĉi-kune nian novan ĉefan varbilon por 1984. Ĝi prezentas la aktualajn adresojn de la kotizperantoj kaj la novajn [illegible]ojn por 1984.

La kotiztabelo por 1984 enhavas ĝeneralan kotizaltiĝon de 12%, kiun aprobis la Komitato de UEA dum la Universala Kongreso. Vi rimarkos, ke ni klopodis kiel eble plej multe limigi tiun altiĝon en landoj kun malpli altaj vivniveloj kaj en landoj, kiuj momente spertas ekonomiajn malfacilaĵojn.

Kvankam laboras unuavice niaj kotizperantoj pri la registrado de membriĝoj en nia Asocio, vi *ĉiuj* povas kaj devus kunhelpi en la varbado de novaj membroj por UEA. Ni petas vin ankaŭ daŭre informi pri la laboro de UEA, tiel ke niaj jamaj membroj sentu ĉiam la emon resti aktivaj en la Asocio kaj la Movado.

Ĉi-jare ni aperigas malpezan neampleksan varbilon. Tio ŝparos al landaj asocioj kaj aliaj poŝtkostojn je la enlanda distribuo, kaj permesos al ili aldoni proprajn enlandajn varbilojn. Ni celas krei afiŝecajn varbilojn poste pri niaj unuopaj eldonaĵoj. Tiuj ne portos la adresojn de kotizperantoj kaj kotiztabelon, kaj pro tio estos senlime uzeblaj.

Se ni havas de vi pendantan mendon por la varbilo, ni tion plenumos. Se vi povos distribui nian varbilon, bonvolu mendi kvanton per la suba mendilo. Bonvolu mendi nur tiun kvanton, kiun vi realisme sukcesos disdoni aŭ dissendi ene de la venontaj monatoj.

Fronte al la jubileo, UEA bezonas pli fortan membrobazon! Helpu nin tion atingi! Mendu la varbilojn kaj eklaboru por 1984!

Ni antaŭdankas pro via kunlaboremo kaj entuziasmo,

Kore salutas,

Stefan MacGill
Direktoro de la Centra Oficejo

✂ - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

**MENDILO**

Bv. sendi ________ ekzemplerojn de la varbilo "Fenestro al nova mondo".

Ni uzos ilin jene: ____________________________________________

Bv. sendi laŭeble ankaŭ jenajn varbilojn en jenaj kvantoj:

☐ afiŝon "Konstruu kun ni" pri UEA (297 × 420 mm)
☐ afiŝon pri revuo "Esperanto" (210 × 297 mm)
☐ afiŝon/varbilon pri "Kontakto" (en preparo)
☐ varbilon pri societo Zamenhof (en preparo)
☐ ekzemplerojn de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj en Esperanto.
☐ informilojn kaj mendilojn por anoncoj en la eldonaĵoj de UEA

Nomo: ______________________________ UEA-kodo: ☐☐☐☐-☐ Dato: ______________

Adreso: ______________________________ Subskribo: ______________

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 4 — Majo 1984.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO
Montoyerstrato 37 b24
B-1040 BRUSELO
Tel. (02) 513 59 95

Postĉekkonto 000/0163434.86

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraroj de B.E.F., F.E.L. kaj A.F.E., ankaŭ de lokaj grupoj prizorgu la materialon por la bulteno.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj !

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

BEF - Prezidanto : Marc DEMONTY

10 - 4 - 84

Anne kaj Marc Demonty-Seghers ĝojas anonci la alvenon de
Catherine

Ankaŭ la Belga Esperantistaro sincere ĝojas pro tiu mesaĝo !
Korajn gratulojn kaj bondezirojn al la feliĉaj gepatroj !

**Monda Turismo**

proponas multajn karuselvojaĝojn, karavanojn, flugojn en Eŭropo, Azio kaj Ameriko. Petu kalendaron kaj detalajn informojn ĉe: ESPERANTOTUR-BENELUKSO, Montoyerstr. 37 b 24, B-1040 Bruselo.

NACIAJ KAJ INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

1984

31.05-12.06 Eŭropa rondvojaĝo al Konferenco de Monda Turismo – Toruń-Bydgoszcz PL – kunsidoj, kulturaj spektakloj..'

31.05-03.06 Mediteranea Konferenco de Esperantologio – Villafranca de Penecés E – Prelegoj...

01-10.06 Internacia Esperanta Ŝak seminario – Pisanica BG Prelegoj, ekskursoj

08-12.06 76-a Franca Kongreso de Esperanto – Bourges F

10-17.06 Internacia Beneluksa Renkontiĝo – Bruselo B – Prelegoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj

12-17.06 Esperanto-staĝo komencantoj – La Chaux-de-Fonds CH

19-24.06 Esperanto-staĝo progresantoj – La Chaux-de-Fonds CH

30.06-23.07 Eŭropa rondvojaĝo al Internacia Kurso por E-Instruistoj, al Internacia Infana E-urbeto, al 1-a Internacia Kongreseto de Kastora Klubo – Bydgoszcz PL Kursoj, ekskursoj, vizitoj, konkursoj, sportaĵoj, projekcioj...

01-08.07 1-a Internacia Kataluna Esperantista Feriseмajno – Vilanova i la Geltrú E – Kursoj, lernado de dancoj, instruaj vizitoj kaj ekskursoj, projekcioj, beletra kunsido, teatraĵo, muziko, kantado...

07-21.07 Antaŭkongresa ekskurso Novjorko-Vankuvero USA-CDN

08-15.07 Internacia Beneluksa Renkontiĝo – Bruselo B – Prelegoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj

08-17.07 Internacia Renkontiĝo Naturamika – Abaliget-Pécs H

13-20.07 40-a Internacia Junulara Kongreso – Swanwick GB

14-20.07 Antaŭkongreso en Montrealo CDN

14-21.07 6-a Internacia Ekumena Kongreso de IKUE kaj KELI – Hamburg D

15-20.07 Esperanto-staĝo komencantoj – La Chaux-de-Fonds CH

15-20.07 Eŭropa Kongresa Seminario – Varsovio-Bydgoszcz PL

20-29.07 Esperantotur ĉarterflugo Varsovio-Vankuvero-Varsovio

20.07-10.08 Flugkaravano Belgio-Kanado-Usono – partopreno al UKE kaj dusemajna ekskurso tra Usono...

21-28.07 69-a Universala Kongreso de U.E.A. en Vankuvero CND

22-27.07 Esperanto-staĝo progresantoj – La Chaux-de-Fonds CH

22-28.07 10-a Int. Konf. Neŭtrala E.-Mov. Noordwijkerhout NL

23-29.07 1-a Internacia Somera Esperanto-Universitato – Veliko Tarnovo BG

29.07-10.08 Postkongresa ekskurso Vankuvero-Los Angeles CDN-USA

05-10.08 Monda Kongreso pri Aplika Lingvistiko – Brussels B Prelego de E. Symoens, prezidanto de FEL

-----

Sveda SKOLTA ESPERANTO-LIGO bezonas i.a. fotojn, gazetojn, insignojn, poŝtkartojn kaj markojn, flagojn, afiŝojn, emblemojn, glumarkojn,... pri SEL kaj Esperanto por Ekspozicioj en tuta Svedio.
La kasisto deziras korespondi... : NILS ALVAR EKSTEN, SKOLTA ESPERANTO-LIGO PK.4050, S-261 04 LANDSKRONA, Svedio.

-----

** SZCZECIN INVITAS VIN **
22-a Pola Esperanto-Kongreso
1984-08-18/25

FESTIVALO DE LA ESPERANTO-KULTURO * EDUKA PROGRAMO * EKSKURSOJ...

Info: POLA E-KONGRESO, ul. Jasna 6 00-013 WARSZAWA – PL.
ankaŭ ESPERANTOTUR-BENELUKSO, Montoyerstr. 39 b24. B-1040 BRUSELO.



FLUGKARAVANO BELGIO-KANADO-USONO: julio 20 – aŭgusto 10

Bruselo – Novjorko – VANKUVERO (partopreno en la 69-a UNIVERSALA ESPERANTO-KONGRESO) – dusemajna vojaĝo tra Usono: Seatle – San-Francisko – Los Angeles – Las Vegas – Arizono – Granda Kanjono – Nov-Orleano – Orlando – Ĉikago – Vaŝingtono – Bruselo
Organizanto: "Suno kaj Maro – Libertempo", Milano.
Korespondadreso: Aldo Foa', Via Gulli 19, I-200094 Milano, Italio.

**69-a Universala Kongreso de Esperanto**
**de la 21-a ĝis la 28-a de julio 1984**
**en Vankuvero, Kanado.**

Bonvolu (peti kaj) resendi la aliĝilon kaj fari la pagon al via landa peranto, kiu por Belgio estas la Belga Esperanto-Federacio, Montoyerstrato 37 b.24 B-1040 Bruselo, pĉk 000/0163434.86.

Laŭ nuna kurzo de Guldeno ĉe la plimultaj bankoj en Belgio (18,57 BF.), ni indikas ĉisube la kongreskotizojn en nia nacia mono:

| Kongreskotizoj | |
|---|---|
| 1. Ne individua membro de UEA | 4550 BF |
| 2. Individua membro de UEA | 2900 BF |
| 3. Kunulo/junulo/handikapulo -ne individua membro de UEA | 1950 BF |
| 4. Kunulo/junulo/handikapulo individua membro de UEA | 2600 BF |

La kurzo ĉe ASLK/CGER estas meze pli avantaĝa...
Krome kurzoj de valutoj daŭre ŝanĝiĝas!
Do la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aŭ malgajnoj por la peranto (se ili ne tro altiĝos).
Tamen por malgrandigi la riskojn por la peranto, la aliĝontoj povas pagi rondan sumon aŭ aldoni donacon por la Federacio.
Anticipan dankon!

A.MG.

$$ Aliĝu pere de BEF = subtenu la landan Esperanto-movadon ! $$

EŬROPA KLUBO – franclingva sekcio bezonas pliajn membrojn (!) kaj aktivulojn...
Kontaktadreso: José JACOB, Petit Jonckeu 18, B-4803 Polleur.

**Verda Szczecin'o**
estas kvaronjara bulteno de POLA ESPERANTO-ASOCIO, FILIO, 70.358 SZCZECIN-3. En la antaŭlasta numero, aperis tripaĝa artikolo sub titolo "Esperantistoj vojaĝas" de Ziuta Dołgowska, kiu priskribas la Beneluksan aventuron de 6 Poloj kiujn belga ESPERANTOTUR invitis por semajna restado: vizito de bel(g)aj urboj, ekskurso al UEA-centroj, Internacia Kadrokurso en Bruselo, aĉeto de du aŭtobusoj por Esperantotur... La ŝparemo de BEF-estraro ne permesas al mi raporti en nian bultenon tiom longan artikolon. Mi bedaŭras tion, des pli ĉar la redaktinto elkore laŭdas la organizinton (nome la vicprezidanton Leo De Bruyne) kaj la gastigintojn (ankaŭ lin... kaj la familion Mertens-Goossens). Ni sincere dankas pro tia afableco kaj pro la amikaj memoraĵoj.
Multaj legantoj de nia bulteno povis jam legi tiun artikolon en klubaj informiloj, kaj en "ESPERANTO-turismo".

A.MG.

------

## Al la kandidatoj de la Eŭropaj elektoj 1984 kaj al la politikaj partioj

La multlingveco de la Eŭropa Komunumo estas grava kultura fenomeno. Tamen ni konstatas ke la Eŭropa Komunumo neglektas plurajn minoritatajn lingvojn, ofte donas preferon al la uzado de iuj lingvoj malfavore al aliaj kaj apenaŭ montris intereson por la avantaĝoj de kelkfoja uzo de neetnaj lingvoj.
La **Eŭropa** Klubo esperas ke en la novelektota parlamento multaj partioj kaj politikistoj montros pli grandan intereson por solvoj de la ĉiam pli premanta lingva problemo.
La partioj kaj kandidatoj estas invitataj ... konigi siajn vidpunktojn pri la Eŭropa lingva problemo... Se ili disponigas tekston ... pri sia vidpunkto, la **Eŭropa Klubo** estas preta... publikigi ĝin en... la revuo **Eŭropa Dokumentaro**.
Jena teksto en ok lingvoj estis eldonita de Eŭropa Klubo, kaj estis submetita al la nunaj Eŭroparlamentanoj kaj al pluraj instancoj. Ekzempleroj estas je dispono de ĉiuj kiuj petas ilin.
Eŭropa Klubo Pk.3 B-1040 Bruselo 26.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

KLUBO 100

arangos la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto"
Amikoj kaj simpatiantoj kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn!
Unufoja kotizo minimuma 1000 BF rajtigas voĉdonon en ĉiu kunveno de la klubo, kaj ankaŭ... !!! partoprenon al lotumado de senpaga vojaĝo al UKE Varsovio !!! - per Monda Turismo -
**Sendu viajn pagojn al Bankkonto 034.0379435.33 de KLUBO 100**

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

NB.- La legantoj trovos ĉikune ĝirilon kiun ili povas uzi por la pago de tiu kotizo: pagoj al aliaj kontoj de BEF, FEL aŭ APE, por KLUBO 100, kompreneble akiras la samajn rajtojn al la kotizantoj.

''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''

10-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado

okazos en Leeuwenhorst, Noordwijkerhout, Nederlando, de la 22-a ĝis la 28-a de julio 1984. Konstanta adreso: M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, I, 3015 BC Rotterdam, Nederlando.

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 4 Junio-Julio 1984.


! Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad) !
! de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Montoyerstrato 37 b24 !
! B-1040 BRUSELO !
! Postĉekkonto 000/0163434.86 Tel. (02) 513 59 95 !

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK


Redakcio :
La estraroj de B.E.F., F.E.L. kaj A.P.E., ankaŭ de lokaj grupoj prizorgu la materialon por la bulteno.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj !

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

**KLUBO 100**

$ aranĝos la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto" $
$ Amikoj kaj simpatiantoj kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn! $
$ Unufoja kotizo minimuma 1000 BF rajtigas voĉdonon en ĉiu $
$ kunveno de la klubo, kaj ankaŭ... !!! partoprenon al lotumado $
$ de senpaga vojaĝo al UKE Varsovio !!! - per Monda Turismo - $
$ Sendu viajn pagojn al Bankkonto 034.0379435.33 de KLUBO 100 $

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

NB.- La legantoj trovos ĉikune ĝirilon kiun ili povas uzi por la pago de tiu kotizo: pagoj al aliaj kontoj de BEF, FEL aŭ APE, por KLUBO 100, kompreneble akiras la samajn rajtojn al la kotizantoj.

_._._._._._._._ UKE-UKE-UKE-UKE-UKE _._._._._._._._

En Budapeŝto, ni estis 5000 kongresanoj; inter kiuj 53 el Belgio (plus 10 en Debrecen). Por la malproksima Vankuvero, 4 "kunlandanoj" aliĝis per la landa peranto: ne multnombraj, sed inter la plej famaj !!! : Elfriede Ernst, Barbara Poterucha, Michael Cwik, Jules Verstraeten. Sinjorino Ernst akceptis la honoran taskon saluti la Kongreson en la Malfermo nome de nia landa asocio.

## JE LA MEMORO DE ELZA CHAMPY

En la naŭdeka vivjaro forlasis nin aktivulino kies okuloj kontemplis la majstron. " Li havis grandajn bluajn okulojn kaj Li lasis al mi profundan impreson neforgeseblan ".

Elza naskiĝis la 30-3-1895 en Antverpeno kiel unua filino de francdevena industriisto, kiu partoprenis la Bulojnan kongreson de 1905, kaj organizis kun la antverpenaj samideanoj la Antverpenan Kongreson de 1911. Elza lernis Esperanton dum tiu jaro kaj fieris ke ZAMENHOF estis akceptita en la familia domo.

Profesia flegistino, ŝi aktivadis por la disvastigo de la Internacia Lingvo precipe en katolikaj rondoj, ŝi kontaktis multajn lernejojn kaj diversajn religiajn instancojn. Ŝi trovis fojfoje miskomprenon, sed neniam senkuraĝiĝis kaj renkontis ankaŭ la sukceson.

Dum la jaro 1940, pro ŝia patrujama sinteno, ŝi devis translokiĝi por kaŝi sin kaj vivis en Banneux-Notre Dame. Post la milito ŝi fariĝis instruistino pri lingvoj en Lieĝo kaj tradukistino por la industrio. Ŝi konis sep lingvojn. Ŝi organizis tie klubon aliĝita al IKUE kaj finfine ŝi fariĝis ĝenerala kasisto por tiu movado. Tiu maniere ŝi estis akceptita en Vatikano kun la estrarano far Papa Moŝto Paŭlo VI. Ĉi lasta demandis al ŝi "Vi devus organizi sekretariejon de IKUE en Romo..."

Ŝiaj kursoj kreis en Lieĝo generacion da geesperantistoj inter kiuj pluraj ludas rolojn en la nuntempa Lieĝa Esperanto-Ligo, ero de UEA.

Eĉ dum la lastaj jaroj, kvankam ne bone fartante, ŝi ĝuis kiam ŝi povis instrui la Verdan Lingvon al iuj interesuloj.

Ŝi kiel kredantino forpasis en Befve-Thimister, 1-4-1984 kaj ripozas en familia tombo en Evrehaille-Yvoir.

Louis Muller Sac.
207 rue François Lefebvre
4420 Lieĝo

La Lieĝa Grupo delegis al la entombigo pastron Muller kaj sendis blank-verdan bukedon; partoprenis ankaŭ F-ino A.Ursolini.

Ni ree kondolencas ŝiajn kvar supervivantajn gefratojn, apud kiuj Esperanto restas familia bono.

J.V.

Slavko Šimunić
JURNALISTO
YU-41000 Zagreb, Creska 18
JUGOSLAVIO



Ĉu vi eble kontaktas kun iu kamparana familio en Belgio? Ĉu vi eble povus helpi min verki artikolon pri LA VIVO DE KAMPARANA FAMILIO EN BELGIO? Se vi tion ne povas, ĉu vi povas peri al mi la adreson de iu belga esperantisto kiu spertas en terkulturistaj problemoj en via lando aŭ eble eĉ mem estas terkulturisto, farmisto, hobia ĝardenisto!?? En la agrikultura revuo "SELO" /="Vilaĝo"/ el Beograd mi nome redaktas monatan rubrikon "Vilaĝo kaj terkulturo en la mondo".

RTL - AGADO - RTL - AGADO - RTL - AGADO - RTL - AGADO - RTL - AGADO

## BONVOLU REAGI KAJ DISKONIGI EKSTERLANDEN

Je la fino de 1985, RTL /Luksemburga Televido/ elsendos per satelito kaj eblos kapti ĝiajn programojn en dudeko da eŭropaj landoj.

Kun la estontaj programeroj estas pritraktataj.

Sekve estas tempo por SENPROKRASTE kaj AMASE sugesti al la RTL-estraro regulan programeron ankaŭ en Esperanto, ĉu monate, ĉu eĉ semajne.

SENPROKRASTE ĉar estos tro malfrue, kiam la programeroj estos elektitaj.

AMASE ĉar nur mulnombra reago povos influi decidon. Ni ne forgesu, ke televida programo ne indas por deko da personoj.

Bonvolu proponi tion afable per individua aŭ per kolektiva letero, kiun ankaŭ amikoj de Esperanto povos subskribi. Uzu preferinde la francan, germanan aŭ anglan (eĉ malbone); tamen bonvenos leteroj skribitaj ankaŭ en aliaj eŭropaj lingvoj.

Diskonigu per bultenoj, cirkuleroj, fotokopioj, ktp. . Niaj leteroj inundu la labortablon de la RTL-Direktoro,

Villa Louvigny,
Luxembourg.

P.S. - Neniu vera samideano rifuzos kunlabori!

M.D.

Komuniko ricevita de SONORILO, Doornstraat 22, 2610 Wilrijk, tel03/8272405

- Bindilo por revuo " MONATO ": fortika plasta kolektilo por la jarkolekto. Ĝi ne postulas truojn, sed aplikas metal-stangetojn laŭ mezaj paĝoj. Ĝi havas surpreson sur dorso kaj frontpago. Prezo : 320 BF + ev. sendokostoj
- Libroj de TK-Stafeto : se vi mendas nun 2 ekzemplerojn de libroj de TK - Stafeto samtempe, vi ricevas aŭtomate rabaton de 20 % ( + ev.sendokostoj
- Ĉiuj personoj kiuj mendas libron ĉe SONORILO, ricevas kiel donacon unu Eo-libron ĝis la fino de tiu-ĉi jaro.

31 Aŭg. 2 Sept. 1984

## DUA FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO 1984 - AALST




La kongreso 1983 en Loveno, renovigo de malnova kutimo kaj, ni esperu, la unua el serio de regulaj Esperanto-kongresoj en nia lando, estis tre sukcesplena. .

La dua kongreso okazos en Alsto, la fama karnavalurbo (vidu la insignon apude), kiu situas inter Bruselo kaj Gento. Estas la loka grupo "La Pioniro", kiu prizorges la praktikan organizadon kun Flandra Esperanto-Ligo.(FEL).

LKK preparas kunlabore kun Fleja specialajn programerojn por la junuloj. Kulturo, amuzo, distro sed antaŭ ĉio homaj interkomprenigaj kontaktoj havos nian ĉefan atenton. Inter la diversaj eroj: de komputilo al aviadilo (la kongresurbo rigardata el la ĉielo!), de arta vespero al komuna kantado, de ekspozicieto al flandra kermeso, de serĉpromenado al serioze urbogvidado, ... kiu ne trovos ion laŭ sia gusto? Krome okazos kolokvo pri la kaŭzoj de la stagnado de la internacia lingvo. Grava priokupo estos batalo kontraŭ krokodiloj. Pro tio la slogano de la kongreso estos "Bonvolu praktiki". Pro tio ankaŭ FEL ege ĝojos se multaj eksterlandanoj ĉeestos.

| Kotizo: | ĝis 31 julio | ekde 1 aŭgusto |
|---|---|---|
| plena kotizo | 1500 BF | 1750 BF |
| malpli ol 26 j. | 1200 BF | 1400 BF |
| memzorganto | 300 BF | 300 BF |

Petu aliĝilojn kaj glumarkojn de la kongreso ĉe la

Kongresa Sekretariejo: Esperanto-Kongreso 1984
Wilgstraat 25A, B-9440 Erembodegem-Aalst.

Jen la nova FLEJA- ESTRARO, elektita dum la jarkunveno de 18 marto 1984 en Antverpeno:

Prezidanto: Wim Tytgat
Sekretario: Annemie Suykens
Kasisto: Ite Tytgat
Kongresoj kaj
Eksteraj Rilatoj: Ilse Jacques

Varbado: Kiki Tytgat
Kunlaboranto: Jan Erreygers
Jen: André Ruysschaert
Koncize: Wim Tytgat
Respondeculo en la Esperanto-Centro Antverpeno: Jean-Pierre VandenDaele

La 7A FLEJA-RENKONTIĜO okazos de 2 ĝis 4 novembro 1984 en DE PINTE (apud Gent) kun la temo: Junuloj kaj la krizo. Aliĝiloj estas nun jam haveblaj (ĉe Ilse Jacques: Molenstraat 29, B-2000 Antwerpen). Pli detalaj informoj en la venonta numero de Koncize ...

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 4 Aùgusto-Septembro 1984.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO
Montoyerstrato 37 b24
B-1040 BRUSELO
Tel. (02) 513 59 95

Postĉekkonto 000/0163434.86

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraroj de B.E.F., F.E.L. kaj A.P.E., ankaù de lokaj grupoj, prizorgu la materialon por la bulteno.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj !

Informiloj povas tute aù parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aùtoro).

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

### KLUBO 100

arangôs la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto"
Amikoj kaj simpatiantoj kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn!
Unufoja kotizo minimuma 1000 BF rajtigas voĉdonon en ĉiu kunveno de la klubo, kaj ankaù... !!! partoprenon al lotumado de senpaga vojaĝo al UKE Varsovio !!! - per Monda Turismo -
Sendu viajn pagojn al Bankkonto 034.0379435.33 de KLUBO 100

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

NB.- La legantoj trovos ĉikune ĝirilon kiun ili povas uzi por la pago de tiu kotizo: pagoj al aliaj kontoj de BEF, FEL aù APE, por KLUBO 100, kompreneble akiras la samajn rajtojn al la kotizantoj.

================================================================

LA INTERNACIA ESPERANTISTA PILGRIMADO AL BANNEUX

P. Muller komunikis ke ĝi ĉiam okazas la duan dimanĉon de septembro...
La 8a Pilgrimado al la Virgulino de Malriĉuloj okazos do dimanĉon 09.09.1984. Org. MULLER Louis, 207 r. Fr. Lefebvre, 4420 Liège.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

En ĉijaraj ĝeneralaj kunsidoj:

Flandra Esperanto-Ligo elektis novan prezidanton: Ivo Durwael.

Eŭropa Klubo elektis vicprezidanton: André Mertens Goossens.

Gratulojn kaj bondezirojn!

**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**EK**

BRUSELAJ VINBERTAGOJ – 30 Septembro 1984
10h. Renkontiĝo giĉethalo de la Brusela Centra Stacidomo.
Vizitoj al Muzeoj kaj al VINBERUJEJO – Promenado kaj biciklado...
Antaŭanonco nepre necesa...

ESTONTA KADROKURSO PRI TURISMO: 13 kaj 14 oktobro en Lieĝo.
Loko: Lieĝa Universitato.

Programplano: – Esperanto-turismaj spertoj en Bulgario.
– La turismo en la seka afrika sezono.
– Blinduloj en vojaĝgrupoj.

Inf. ESPERANTOTUR-BENELUKSO, Montoyerstr. 37 b24, B-1040 Bruselo.

---- APE --- APE --- APE --- APE --- APE ----
<u>ASOCIO POR ESPERANTO</u>

La ĝenerala kunsido de A.P.E. okazos en Lieĝo la 13-an de oktobro...
Andrée Orsolini.

----- --- --- --- --- --- --- --- --- --- -----

10a INTERNACIA FOIRO DE ESPERANTO-TURISMO
* Pionira Karuselvojaĝo EŬROPO-AZIO *
de la 19a de oktobro ĝis la 4a de decembro 1984.
Org. ESPERANTOTUR-BENELUKSO...

"""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""

FLEJA-SEMAJNFINO
"JUNULOJ kaj la KRIZO en EŬROPO" – DE PINTE 2-3-4 Novembro 1984.
Abundos interesaj prelegoj, kunsidoj, eblecoj por diskuti en etaj aŭ egaj grupoj, ktp. Kompreneble, ankaŭ la distra flanko de la semajnfino large plenumos viajn postulojn...
Aliĝiloj: Ilse JACQUES, Molenstr. 29, B-2018 Antwerpen.

** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF **

Sabate 20/10/84, la jarkunveno de la Belga Esperanto-Federacio okazos laŭ jena skemo:

10-an. estrarkunsido, 14-a h. : prelego pri KLUBO 100, kutimaj raportoj, plie : 4-a kunveno de KLUBO 100.

Loko : " Tea-room " de la brusela centra stacidomo
( flanko de la Ravensteinstrato )
Tiu ejo estas disponigota dank'al kunlaboro kun BEFA
-(L.De Sutter).

** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF ** BEF **

---



KLUBO 100 – 2-a listo de kotizantoj.

| | |
|---|---|
| JACQUES Jean Marie | 1000. |
| THIBE Jacques | 200. |
| ESPERANTUJO CHARLEROI | 1000. |
| GUYOT Mathieu | 1000. |
| SIMON Ferdinand | 1000 |
| THOLET Clément | 1000 |
| ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO | 581 |
| LECAT R. | 1020 |
| BRISON Ghislain | 1000 |
| DEPREZ René | 1000 |
| BURNAY Robert (laŭ BEF) | 1000 |
| ORSOLINI Andrée | 1000 |
| ERNST Elfriede | 3000 |

Sumo je la fino de julio: 26801 BF

Dankon por la helpo al tiu grava agado !
Pluraj asociaj kaj grupaj organoj ankoraŭ alvokis siajn membrojn subteni la Klubon ! Baldaŭ povos aperi plia listo...

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

Naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj

1984

| | |
|---|---|
| Tutjare | Esperanto-staĝoj – la Chaux-de-Fonds CH |
| | Konstanta Internacia E-Lernejo – Bydgoszcz PL – kursoj, vizitoj, ekskursoj |
| | Internacia Esperanto-Kursejo – Pisanica BG – dusemajnaj kursoj, edukaj aktivecoj, prelegoj, kantadoj, aŭdvidaj aranĝoj, filmoj, dancadoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj, studaj vojaĝoj |
| 31.08-02.09 | Flandra Esperanto-Kongreso – Aalst B – kolokvo, arta vespero, kantado, serĉpromenado, urbogvidado... |
| 01-07.09 | Internacia Blindula Esp.-Renkontiĝo – Pisanica BG – Prelegoj, variaj aktivecoj |
| 01-14.09 | Internacia Renkontiĝo Ludo "GO" – Pisanica BG |
| 09.09 | Esperantista Pilgrimado al la Virgulino de Malriĉuloj – Banneux B |
| 09-16.09 | Internacia Beneluksa Renkontiĝo – Bruselo B – Prelegoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj |
| 14-21.09 | Internacia Kuirarta Konkurso – Bursa TR |
| 07-14.10 | Internacia Beneluksa Renkontiĝo – Bruselo B – Prelegoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj |
| 13.10 | Jarkunsido de Asocio por Esperanto – Lieĝo B |
| 13-14.10 | Internacia Kadrokurso pri Turismo – Lieĝo B |
| 19.10-05.12 | Karuselvojaĝo Eŭropo-Azio ekde Bruselo B |
| 20.10 | Jarkunveno de Belga Esperanto-Federacio – Bruselo B<br>Kunveno de Klubo 100 – Bruselo B |
| 22-26.10 | 10-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo – Bydgoszcz PL |
| 27.10-05.11 | Lasta ĉijara Esperanto-feriado – Pisanica BG<br>E-kurso, prelegoj, lumbildoj, vizitoj, ekskursoj... |
| 02-04.11 | FLEJA-semajnfino – De Pinte B – prelegoj, diskutoj |

Internacia Esperanto-Kursejo – BULGARIO
Info: EEC. Montoyerstr. 37/b24, 1040 Bruselo.

Materialoj pri Uzbekistano serĉataj

Samarkanda Esperanto-Klubo organizas oktobre 1984 internacian ekspozicion "UZBEKISTANO TRA LA OKULOJ DE EKSTERLANDANOJ", dediĉitan al 60-jariĝo de Uzbeka SSR. Tiucele estas kolektataj eldonitaj eksterlande ĉiulingvaj materialoj pri Uzbekistano. INTERKLUBO "ESPERANTO", SU- 703000 SAMARKANDO, Glavpoĉtamt, abon. Ja. 76, UZBEKISTANO USSR.

---

Kieva Esperanto-klubo de internacia amikeco
ORA PORDEGO

volas kolekti afiŝojn kaj materialojn pri la temo de mediprotektado (krome pri kontraŭfuma kaj kontraŭalkohola temoj) por organizi fine de la jaro ekspozicion "Nia hejmo - Tero". Sovet-Unio 252200, Kiev 200, p. k. 539/1, Lineckij Miĥail.

---

&&& MONDA FONDUSO DE SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO &&&
////////////////////////////////////////////// //////////////////////
La specifeco de la "Monda Fonduso" estas meti la problemon de la individua rajto nutriĝi je la nivelo de monda juro kaj celi respondi al ĝi pere de transnacia organizado de la solidareco sub la leĝaro de la Kongreso de la Popoloj.
//////////////////////////////////////////////////////////////////////
Informilo ĉe BEF, Montoyerstr. 37 b24 B-1040 Bruselo.

---

TURISMI EN NICE
30.03 ĝis 06.04.1985: Internacia Esperanto-Semajno organizita de Provenca Esperanto-Federacio. Inf.: LLORENS, Les Hortensias 2, 121 bis Bd Napoléon III, F-06200 Nice.

---

BONVENO ATENDAS VIN EN KIMRUJO

La 69-a Brita Kongreso de Esperanto okazos en Kimrujo je Pasko 1985, inter la 5-a kaj la 8-a de aprilo. La Loka Kongresa Komitato persvadis la Turisman Instancon de Kimrujo provizi broŝuron en Esperanto; ĝi estas havebla de la sekretario de Esperanto-Federacio de Kimrujo: John BECKER, Henfryn Mill House, Pentre-cwrt, Llandysul, Dyfed, Britujo, SA44 5BD.
J. Adrian OATES, LKK-ano.

==============================================================

19a MARKOLA KONGRESO - BRUGGE - 19-21 APR. 1985

---

Markola Kongreso estas ĉiujara renkontiĝo de Esperantistoj el la marbordaj reegionoj de Belgio, Britio kaj Francio...

Inf. Roland ROTSAERT, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge.
(El NOVAĴLETERO, informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista - R.S.)

==============================================================

Eŭropa Esperanto-Centro

Por ĉiuj urĝaj mesaĝoj, vi povas telefoni al la numero 03-233.66.81 (priv. Anne TILMONT).



KLUBO 100 - 2-a listo de kotizantoj.

| | |
|---|---|
| JACQUES Jean Marie | 1000. |
| THIBE Jacques | 200. |
| ESPERANTUJO CHARLEROI | 1000. |
| GUYOT Mathieu | 1000. |
| SIMON Ferdinand | 1000 |
| THOLET Clément | 1000 |
| ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO | 581 |
| LECAT R. | 1020 |
| BRISON Ghislain | 1000 |
| DEPREZ René | 1000 |
| BURNAY Robert (laŭ BEF) | 1000 |
| ORSOLINI Andrée | 1000 |
| ERNST Elfriede | 3000 |

Sumo je la fino de julio: 26801 BF

Dankon por la helpo al tiu grava agado !
Pluraj asociaj kaj grupaj organoj ankoraŭ alvokis siajn membrojn subteni la Klubon ! Baldaŭ povos aperi plia listo...

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

Naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj

1984

| | |
|---|---|
| Tutjare | Esperanto-staĝoj - la Chaux-de-Fonds CH |
| | Konstanta Internacia E-Lernejo - Bydgoszcz PL - kursoj, vizitoj, ekskursoj |
| | Internacia Esperanto-Kursejo - Pisanica BG - dusemajnaj kursoj, edukaj aktivecoj, prelegoj, kantadoj, aŭdvidaj aranĝoj, filmoj, dancadoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj, studaj vojaĝoj |
| 31.08-02.09 | Flandra Esperanto-Kongreso - Aalst B - kolokvo, arta vespero, kantado, serĉpromenado, urbogvidado... |
| 01-07.09 | Internacia Blindula Esp.-Renkontiĝo - Pisanica BG - Prelegoj, variaj aktivecoj |
| 01-14.09 | Internacia Renkontiĝo Ludo "GO" - Pisanica BG |
| 09.09 | Esperantista Pilgrimado al la Virgulino de Malriĉuloj - Banneux B |
| 09-16.09 | Internacia Beneluksa Renkontiĝo - Bruselo B - Prelegoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj |
| 14-21.09 | Internacia Kuirarta Konkurso - Bursa TR |
| 07-14.10 | Internacia Beneluksa Renkontiĝo - Bruselo B - Prelegoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj |
| 13.10 | Jarkunsido de Asocio por Esperanto - Lieĝo B |
| 13-14.10 | Internacia Kadrokurso pri Turismo - Lieĝo B |
| 19.10-05.12 | Karuselvojaĝo Eŭropo-Azio ekde Bruselo B |
| 20.10 | Jarkunveno de Belga Esperanto-Federacio - Bruselo B<br>Kunveno de Klubo 100 - Bruselo B |
| 22-26.10 | 10-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo - Bydgoszcz PL |
| 27.10-05.11 | Lasta ĉijara Esperanto-feriado - Pisanica BG<br>E-kurso, prelegoj, lumbildoj, vizitoj, ekskursoj... |
| 02-04.11 | FLEJA-semajnfino - De Pinte B - prelegoj, diskutoj |

Internacia Esperanto-Kursejo - BULGARIO
Info: EEC. Montoyerstr. 37/b24, 1040 Bruselo.

Materialoj pri Uzbekistano serĉataj

Samarkanda Esperanto-Klubo organizas oktobre 1984 internacian ekspozicion "UZBEKISTANO TRA LA OKULOJ DE EKSTERLANDANOJ", dediĉitan al 60-jariĝo de Uzbeka SSR. Tiucele estas kolektataj eldonitaj eksterlande ĉiulingvaj materialoj pri Uzbekistano. INTERKLUBO "ESPERANTO", SU- 703000 SAMARKANDO, Glavpoĉtamt, abon. Ja. 76, UZBEKISTANO USSR.

---

Kieva Esperanto-klubo de internacia amikeco
ORA PORDEGO

volas kolekti afiŝojn kaj materialojn pri la temo de mediprotektado (krom pri kontraŭfuma kaj kontraŭalkohola temoj) por organizi fine de la jaro ekspozicion "Nia hejmo - Tero". Sovet-Unio 252200, Kiev 200, p. k. 539/1, Lineckij Miĥail.

---

&&& MONDA FONDUSO DE SOLIDARECO KONTRAU LA MALSATO &&&

////////////////////////////////////////////////////////////////////

La specifeco de la "Monda Fonduso" estas meti la problemon de la individua rajto nutriĝi je la nivelo de monda juro kaj celi respondi al ĝi pere de transnacia organizado de la solidareco sub la leĝaro de la Kongreso de la Popoloj.

////////////////////////////////////////////////////////////////////

Informilo ĉe BEF, Montoyerstr. 37 b24 B-1040 Bruselo.

---

TURISMI EN NICE

30.03 ĝis 06.04.1985: Internacia Esperanto-Semajno organizita de Provenca Esperanto-Federacio. Inf.: LLORENS, Les Hortensias 2, 121 bis Bd Napoléon III, F-06200 Nice.

---

BONVENO ATENDAS VIN EN KIMRUJO

La 69-a Brita Kongreso de Esperanto okazos en Kimrujo je Pasko 1985, inter la 5-a kaj la 8-a de aprilo. La Loka Kongresa Komitato persvadis la Turisman Instancon de Kimrujo provizi broŝuron en Esperanto; ĝi estas havebla de la sekretario de Esperanto-Federacio de Kimrujo: John BECKER, Henfryn Mill House, Pentre-cwrt, Llandysul, Dyfed, Britujo, SA44 5BD.

J. Adrian OATES, LKK-ano.

===

19a MARKOLA KONGRESO - BRUGGE - 19-21 APR. 1985

---

Markola Kongreso estas ĉiujara renkontiĝo de Esperantistoj el la marbordaj reegionoj de Belgio, Britio kaj Francio...

Inf. Roland ROTSAERT, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge.
(El NOVAĴLETERO, informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista - R.S.)

===

Eŭropa Esperanto-Centro

Por ĉiuj urĝaj mesaĝoj, vi povas telefoni al la numero 03-233.66.81 (priv. Anne TILMONT).



!!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!

70-a Universala Kongreso de Esperanto
3-10 aŭgusto 1985
Aŭgsburgo, FRGermanio.

Bonvolu (peti kaj) resendi la aliĝilon kaj fari la pagon al via landa peranto, kiu por Belgio estas la Belga Esperanto-Federacio, Montoyerstrato 37 b.24 B-1040 Bruselo, pĉk 000/0163434.86.

Laŭ nuna kurzo de Guldeno ĉe la plimultaj bankoj en Belgio (18,23 BF.), ni indikas ĉisube la kongreskotizojn en nia nacia mono:

| Kongreskotizoj validaj ĝis | 84-12-31 | 85-05-14 |
|---|---|---|
| 1. Ne individua membro de UEA | 2845 BF | 3430 BF |
| 2. Individua membro de UEA | 2280 BF | 2845 BF |
| 3. Kunulo/junulo/handikapulo -ne individua membro de UEA | 1715 BF | 2280 BF |
| 4. Kunulo/junulo/handikapulo individua membro de UEA | 1030 BF | 1715 BF |

La kurzo ĉe ASLK/CGER estas meze pli avantaĝa...
Krome kurzoj de valutoj daŭre ŝanĝiĝas!
Do la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aŭ malgajnoj por la peranto (se ili ne tro altiĝos).
Tamen por malgrandigi la riskojn por la peranto, la aliĝontoj povas pagi rondan sumon aŭ aldoni donacon por la Federacio.
Anticipan dankon!

A. MG.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

$$ Aliĝu pere de BEF = subtenu la landan Esperanto-movadon ! $$

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

La Federacia Respubliko Germanio

Tiu bela, plenkolora faldfolio donas koncizajn informojn pri la lando de la 70-a Universala Kongreso; ĝi estas senpage ricevebla de Deutsche Zentrale für Tourismus, Beethovenstr. 69, D-6000 Frankfurt-a-M.1, FR Germanio.

******************************************************************

"Voĉo de Handikapuloj"

ekaperis: ĝi estas dumonata organo de Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj; abonprezo estas 12 DM. aŭ egalvaloro. Abonon oni bonvolu direkti al "Voĉo de Handikapuloj", YU-56227-Borovo, Školska ul. 25, Jugoslavio.

Verduloj

Fondiĝis Asocio de Verdulaj Esperantistoj (AVE), kies celo estas disvastigi Esperanton inter la membroj de politikaj partioj "verdaj", kiuj interesiĝas pri ekologia politiko. Informojn petu de : C. Fettes, St. Columba's College, Dublin 16, Irlando.

KVINDEK JAROJ DE ESPERANTO

Veterana Esperantisto, propagandisto, verkisto, komponisto, 70-jara angla advokato, jubileas per rondvojaĝo dum 1984 donante lumbildan kaj magnetofonanprezentadon. Grupoj povas skribi al: Frank Buckley, 620 Filton Avenue, Bristol BS12 7LD, Britujo

Deziras korespondi
==================

26-jara studentino, interesiĝas pri pedagogio, psikologio, filozofio, muziko, lingvoj esperanta, franca, rusa, germana... Klàra Katona, Budapest, Németvölgyi út 57/59, H-1124, Hungario

39-jara librokomercistino, edz. veterinaro, d. k. kun esperantist(in)o sp. el librejo, eldonejo, biblioteko..., interesas literaturo, muziko, kulturhistorio, artmetio, kuirarto. Margit Möbius, DDR 8211 Mohorn, Freiberger str. 66.

Vivu la Belga-Hungara amikeco ! K. 15-jara int. lando kaj popolo. Kocsor Károly, 5700 Gyula, Kuznyeck ltp. Nr. III/9, Hungario.

44-aĝa juristo, edziĝinta, h. 2 filojn, hobioj: vojaĝo, historio, arto, arthistorio, klasika muziko ktp., d. kor. k. interŝanĝus magnetofonkasetojn kl. muz., kolektas bildk. montr. artmonum. D-ro István Szabó, Eger, Zalka Máté u. 2.VII/50, Hungario 3300.

Instruistino d. ligi amikecon: skribu pri lando kaj hobio, sendu vian foton... Marianna Leszczyńska, 58-100 S'widnica, ul. Lelewela 8 m 5, Pollando.

Instruistino d. k. kun belgaj geviroj: int. literaturo, historio, ĉiut. aĵoj. Marcella Kovács, Bakonszeg, Deák F u 2, H.4164 Hung.

Filatelisto edz. 33-j. GDR d. i. poŝtmarkojn; int. fotogr., arto k kult. popoloj. Henrick Marschner, 8703 Bernstadt, Kirchgasse 6.

21-jara studento fiziko al Tekn. Univ. Muniko, s. bruselan korespondamikinon. Int. ŝako kaj ludas en blovorkestro... Wolfgang Neff, Poettmeser Str. 6, D-8897 Poettmes-Grim.

18-jara en la 4-a klaso de gimnazio d. k. Medveczki Gábor, Debrecen, Ivolya u. 9, 4027 Hungario.

14-jara d. k. kun belga knabo/knabino. Lyczba Alexander, Bp. Kasràsdülö u. 3; VIII. I74, 1031 Hungario.

Hungara univ. studento, 21-j., int. muziko, literaturo, turismo, naturo, vivo de belgaj studentoj k. junuloj. Hegyi Gyula, Szeged, Lenin krt. 36-38, II.Lcs. III.am. 2. 6720 Hungario.

D. k. kun samid.
Despina Papadopoulou, st. Konitsis 13. Goudi 623, Athenes, Grece.

SKRIBU !!!

Multajn korespond-petojn ricevas BEF: multajn adresojn el ĉiuj kontinentoj posedas BEF. Petu kaj vi ricevos !

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 4 Oktobro-Decembro 1984.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO
Montoyerstrato 37 b24
B-1040 BRUSELO
Tel. (02) 513 59 95
por neurĝaj aferoj

Poŝtĉekkonto 000-0163434-86
por donacoj kaj kostopagoj...

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraroj de B.E.F., F.E.L. kaj A.P.E., ankaŭ de lokaj grupoj, prizorgu la materialon por la bulteno.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj !

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

## KLUBO 100

aranĝos la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto"
Amikoj kaj simpatiantoj kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn !
Unufoja kotizo minimuma 1000 BF rajtigas voĉdonon en ĉiu kunveno de la klubo, kaj ankaŭ... !!! partoprenon al lotumado de senpaga vojaĝo al UKE Varsovio !!! - per Monda Turismo -
Sendu viajn pagojn al Bankkonto 034-0379435-33 de KLUBO 100 !

NB.- La legantoj trovos ĉikune ĝirilon kiun ili povas uzi por la pago de tiu kotizo: pagoj al aliaj kontoj de BEF, FEL aŭ APE, por KLUBO 100, komprenenble akiras la samajn rajtojn al la kotizantoj.

Feliĉan Jarfinon ! ***BEF*** Prosperan Novjaron !

KLUBO 100 -
korektita 2-a listo de kotizantoj.

| | |
|---|---|
| JACQUES Jean Marie | 1000. |
| THIBE Jacques | 200. |
| ESPERANTUJO CHARLEROI | 1000. |
| GUYOT Mathieu | 1000. |
| SIMON Ferdinand | 1000. |
| THOLET Clément | 1000. |
| ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO | 581. |
| LECAT R. | 1020. |
| BRISON Ghislain | 1000. |
| DEPREZ René | 1000. |
| ORSOLINI Andrée | 1000. |
| ERNST Elfriede | 1000. |
| BURNAY Robert | 1000. |
| DE SUTTER Lucien | 1000. |

KLUBO 100 - 3-a listo de kotizantoj.

| | |
|---|---|
| SLABBINCK Laura | 1000. |
| TSIRIMOKOS Angelos | 2000. |
| THILIE Jacques | 500. |
| DEBROUWERE Gerard | 1000. |
| JADOT Arlette | 1000. |
| VAN DOOREN Frans | 250. |
| DE HANTSELLES J.M. | 100. |
| STAES Elly | 500. |
| LIEGE ESPERANTO | 1000. |
| DE ROOVER Hendrik | 200. |
| NEEFS-VANSTAEN F. | 1000. |

1-a listo de pagintoj ĉe FEL:

| | |
|---|---|
| LODOR A. | 1000. |
| DE SMET W. | 1000. |
| LEIBOVITCHE G. | 1000. |
| GERARD R. | 1000. |
| DE ROOVER R. | 1000. |
| DE BRUYNE L. | 1000. |
| DECLERCK C. | 1000. |
| D'HULSTER A. | 1000. |

-------

| | |
|---|---|
| Al konto de FEL (laŭ E-P) | 8000. |
| Al konto de KLUBO 100 (je la fino de novembro) | 34351. |
| Provizora sumo | 42351 BF |

Dankon por la helpo al tiu grava agado !
Pluraj asociaj kaj grupaj organoj ankoraŭ alvokis siajn membrojn subteni la Klubon ! Baldaŭ povos aperi plia listo...
A. MG.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

**Someraj Universitataj Kursoj**
Subtenu ! Aniĝu ! Jara kotizo 750 F al pĉk. 000-0185091-15 de S.U.K., Boîte Postale 62, Liège X. - Inf. sekr. José JACOB.



"JAPANIO" = 28a INTERNACIA SEMINARIO
27-a de decembro 1984 ĝis 3-a de januaro 1985 en Wetzlar, FRG.
La temo Japanio estos traktata en laborgrupoj, kursoj, forumoj kaj prelegoj laŭ plej diversaj aspektoj: lando, kulturo, socio...
Informiloj/aliĝiloj ĉe BEF kontraŭ poŝtmarko aŭ respondkupono, aŭ ĉe GEA-estrarano Franz Kruse D-2800 Bremen 1, Mathildenstr. 73

££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
La sekretariino D-rino Ariella Colombin sendis al BEF invitilon por la fest-premiado de la poezia konkurso "INTERNACIA AMIKECO". la fest-premiado estas parto de plurtaga arango kiu disvolviĝas de la 14-a ĝis la 16-a de decembro en la sidejo de TEA, via Trento 1, I-34132 Trieste, Italio.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

H O R I Z O N T O
estas kultura kaj informa revuo de la Neŭtrala Esperanto-Movado
Informilo/abonilo ĉe la sekretario:
M. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, IR, NL-3015 BC Rotterdam.

--------------

11-a INTERNACIA KONFERENCO de Internacia Centro de la NEUTRALA ESPERANTO-MOVADO
okazos en Metz (Francio), 27-a de julio - 3-a de aŭgusto 1985.
Konstanta adreso: M. de Zilah, 39 rue Joseph Hénot, F-57070 METZ.

--------------

1-a Internacia Forumo de la MONDA FEDERACIO DE KULTURAJ ASOCIOJ okazos dum la 11-a Internacia Konferenco de ICNEM 27.07-03.08.85.
Sekr: D-ro Eugène de Zilah, 39, rue Joseph Hénot, F-57070 METZ.

---

"1-a PSI" PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA
5a-12a de APRILO 1985 Bielefeld. Germana Esperanto-Asocio invitas vin al paska renkontiĝo por la tuta familio.
Informiloj/aliĝiloj ĉe BEF kontraŭ poŝtmarko aŭ respondkupono, aŭ ĉe GEA-estrarano Franz Kruse D-2800 Bremen 1, Mathildenstr. 73

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

Germana Esperanto-Junularo invitas 22-29.7.1985
41. IJK * 41-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO SCHLOSS ERINGERFELD
kaj post la IJK 6 tagoj en postkongreso, ĝis la UK en Augsburg.
Informiloj/aliĝiloj ĉe BEF kontraŭ poŝtmarko aŭ respondkupono, aŭ ĉe LKK, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg.

---

<u>Sistemoj kaj modeloj de la publika klerigado</u>
La Hungara Esperanto-Asocio... organizos konferencon inter la 21-a kaj la 25-a de marto 1985, en Budapeŝto...
Leteradreso: Kultura Komisiono de HEA, H-1368 Budapest. Pf. 193.

-------

Teatra Festivalo en Budapeŝto !
Inter la 22-a kaj la 26-a de marto 1985 okazos 7 teatraj prezentadoj esperantligvaj en la Budapeŝta Teatro "Radnóti".
Skribu al Turisma Komisiono de HEA, Pf. 193. H-1368 Budapest.

---

## INFORMO DE I.E.K.A.

LA AUTOMOBILISTA KLUBO PREPARIS PLANON DE EUROPO por helpi al la aŭtomobilistoj, kiuj veturos al la kongreso de Augsburg.
Sur tiu plano estas indikitaj ĉiuj urboj kie loĝas UEA-delegitoj de I.E.K.A. kaj pri turismo, gastigado, S.O.S.-aŭtoservo, aŭtomobilaj aferoj.
Se vi deziras ricevi ĝin kun informoj, bonvolu skribi al :
I.E.K.A. J. GUILLAUME 66 DE GRASSE VILLAGE F-78810 FEUCHEROLLES

!!!!!! UKE !!!!!! UKE !!!!!! UKE !!!!!! UKE !!!!!! UKE !!!!!!

70-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
3-10 aŭgusto 1985
Aŭgsburgo, FRGermanio.

Erich Sandner, vic-prezidanto, kaj Hermann Schmidt, sekretario de la LKK, afable atentigas ke la urbo Augsburg forte subtenas LKK.
Unua Bulteno skize montras la belaĵojn de la kongresurbo...
kaj entenas salutvortojn de la ĉefurbestro Hans Breuer kaj de la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, D-ro Ludwig Röll.

<u>Kotizoj por Aŭgsburgo ekde 01.01.85.</u>

| Kongreskotizoj validaj ĝis | 85-05-14 | poste |
|---|---|---|
| 1.Ne individua membro de UEA | 3400 BF | 3960 BF |
| 2.Individua membro de UEA | 2820 BF | 3400 BF |
| 3.Kunulo/junulo/handikapulo ne individua membro de UEA | 2260 BF | 2820 BF |
| 4.Kunulo/junulo/handikapulo individua membro de UEA | 1700 BF | 2260 BF |

La kurzo ĉe ASLK/CGER estas meze pli avantaĝa...Krome kurzoj de valutoj daŭre ŝanĝiĝas! Do la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aŭ malgajnoj por la peranto (se ili ne tro altiĝos).
Tamen por malgrandigi la riskojn por la peranto, <u>la aliĝontoj povas pagi rondan sumon aŭ aldoni donacon por la Federacio</u>.
Anticipan dankon!

A.MG.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$
$$ Aliĝu pere de BEF = subtenu la landan Esperanto-movadon ! $$
$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$



<u>Protokolo de la estrarkunveno de B.E.F., okazinta je 20/10/84 en Bruselo</u>

Ĉeestas ( alfabete ) : M.Demonty, E.D'Hondt, L.Drèze, I.Durwael, A.Mertens-Goossens, C.Tholet, J.Verstraeten.
Senkulpiĝis : J.Bovendeerd, E.Symoens.
Komenco : 9.15

- MD demandas, ĉu estas rimarkoj pri la protokolo de la antaŭa kunveno ( 22/10/83 ). Ĉiuj aprobas ĝin.
- AMG,JV kaj MD anoncas sian pretecon rezigni pri estraraj funkcioj, se estas novaj kandidatoj. Neniu reagas.
- AMG proponas, ke la kunvenoj ( almenaŭ de la kernestraro ) iĝu pli oftaj, kaj ke okazu redakciaj kunvenoj por la bulteno. MD sugestas, ke kiel por la nuna kunveno, tia plioftiĝo realiĝu per samtaga okazigo de la kunvenoj de BEF kaj tiuj de Klubo 100, ĉar estas ± la samaj homoj.
- Longa diskuto disvolviĝas pri la financa funkciado de K.100, ĉefe rilate subtrahon de impostoj. Por garantii koherecon, ĝi retroviĝas en la protokolo de la 4-a kunveno de K.100 .
- Financoj de BEF : LD transdonas al JV la ciferojn de APE. JV raportas pri la financa situacio, substrekante la ekvilibrigan rolon por la pasinta jaro [illegible]a enspezoj pro la internaciaj rilatoj. Komparo inter elspezoj por Eo en m[illegible]che kaj Eo en Belgio montras ke ĉi-lasta, malgraŭ limigoj, ŝajnas sufiĉe kosta. JV informiĝos ĉe P.Feeraerts pri detaligo de la kostoj. ID avertas la ĉeestantojn pri la danĝeroj ligitaj kun la situacio por la venonta jaro: laŭ li necesas trovi novajn enspezojn kaj limigi elspezojn. JV proponas, ke la rentumo de la fondaĵoj iru al la ĝenerala kaso, konsiderante la malfacilecon ekvilibrigi la buĝeton. Leviĝas la demando pri kompenso de EEC pro la nuna subluado : JV informiĝos pri tio ĉe G.Maertens.
- La sekretariaj raportoj de FEL kaj APE estas prezentotaj dum la posttagmeza ĝenerala kunveno.
- Interkonsentinte pri la tagorodo de la ptm, la ĉeestantoj interrompas la oficialan kunsidon je 12.15.

MD

<u>Protokolo de la ĝenerala jarkunveno de BEF, okazinta je 20/10/84 samloke</u>

Ĉeestas : kiel matene + M.Delforge, R.De Schepper, L.De Sutter, E.Ernst, A.Staes, R.Steenhout, M.Vereecken.
Senkulpiĝis : AMG

1. Aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno ( 22/10/83 ). MD laŭtlegas ĝin, ĉeestantaro silente aprobas.

2. Raportoj
   2.1. Financa raporto
   JV klarigas la en- kaj elspezojn dum la pasinta jaro. LDS demandas, kial Eo Panorama ne estas subvenciata, JV respondas ke ĝin subvencias la flandra ministerio. RDS demandas, ĉu diversaj elspezoj rekte rilatas EEC, JV konfirmas tion. Pri la buĝeto, JV supozas ke la subvencioj malaltiĝos, sed surpapera ŝveligo celas instigon de la instancoj.
   2.2. Sekretariaj raportoj
   2.2.1. APE : legas ĝin LD ( vidu aliloke )
   2.2.2. FEL : legas ĝin ID ( same)
   Priparolinda estas rimarko pri la kadrokursoj : mankis iniciatoj ekde kiam ili estas konfiditaj al BEF. MD atentigas ke pro pli limigita sukceso de la 2a ondo, eble estis utile lasi iom da tempo. Laŭ AS, FEL planas novajn temojn, sed atentos por ne okazigi ilin samtempe kun BEF, celante iun integriĝon.
   2.3. Raporto de BEFA: legas ĝin LDS, dank'al kiu estas disponigita taŭga ejo je bonaj kondiĉoj.
   2.4. SONORILO . MV legas la raporton. Ŝi donas ciferojn pri la havaĵo de la aspc, kaj procentaĵojn de la klientoj laŭregione. Ŝi mencias sufiĉe gravan aĉeton de la Genta biblioteko, kaj substrekas ke ne okazis disdono de gajnoj al nacia aŭ regionaj asocioj.

( 14.15 - 15.45 )
MD

## A S O C I O   P O R   E S P E R A N T O

Agado dum la periodo : 1.7.83 - 30.6.84

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Je la komenco de julio 1983, okazis la kutima pikniko en Ham-sur-Heure, en kiu partoprenis ĉ. 30 el niaj membroj kaj geanoj de Solre-sur-Sambre (ne aliĝintaj al APE).

Fine de la sama monato, 15 geanoj de APE partoprenis la 68an UK-on en Budapeŝto; S-ino Grela helpe deĵoris en la kongreseto, kaj 2 gejunuloj niaj partoprenis la junularan kongreson en Debrecen.

Je la 28-29/4, APE havis standon en ekspozicio okazanta en la "Boutique Urbaine" en Liège, en la centro de la urbo.

Dum la sama semajfino, niaj membroj, inter kiuj multaj gejunuloj, partoprenis amase la renkontiĝon en Xhoris.

Bedaŭrinde, malmultaj junaj valonanoj ĉeestis la renkontiĝon arangitan en Wavre de la flamanda sekcio de TEJO.

Dum februaro 1984, ĉ. 15 APE-anoj ĉeestis la malfermon de la S.I.A. en Loveno.

Dum aprilo, ni ekkonatiĝis kun Nicole Pairoux, kaj finance helpis ŝin por aperigi ŝian diskon, kaj ni prunte pruntedonis sumon kiun ŝi jam repagis.

Poste, ni aĉetis 10 diskojn, inter kiuj 5 estis sendataj po unu al la 5 centroj de la R.T.B.F.

Komence de majo, unu membro vizitis la markolan kongreson, kaj ĉ. 20 partoprenis la trilandliman renkontiĝon en Eschweiler (RFA).

KURSOJ : La perkoresponda kurso de APE ne plu funkcias, tial ke la lieĝaj membroj kiuj prizorgis ĝin ne plu deziras plenumi tiun taskon.

Krome ĉiuj grupoj gvidas kursojn (sekvas aparta raporto pri la grupa agado). Bedaŭrinde, en Liège la kurso por la 3a-aĝuloj ĉesis pro manko da gepartoprenantoj.

GAZETARA SERVO : S-ro Pirlot daŭre verkas sian rubrikon en la "Dernière Heure". Cetere, ĉiutrisemajne, komunikado estas sendata al 8 franclingvaj gazetoj en Valonio. Fine de junio, ĉ. 200 artikoloj kaj leteroj aperis en la franclingva gazetaro.

La 5an de oktobro 1983, ĉ. 30 personoj kunsidis en Liège por priparoli tiun agadon.

PRELEGOJ DE D-ro FRANK : Post la du antaŭaj prelegoj en Liège, D-ro Frank prelegis, dum novembro 1983, en la Universitato de Mons. Tio havas bonan sekvon ĉar du profesoroj daŭre rilatas kun Paderborn por prizorgi laboron pri lingvistiko pere de Esperanto.

Estis antaŭvidita organizi la postan prelegon en Virton dum la unua semestro de 1984, sed la lerneja estraro preferis prokrasti ĝin ĝis oktobro.

TURISMO : Tial ke la urbaj kaj provincaj financoj daŭre ne floras, ni ne denove petis esperantlingvajn dokumentojn. Ni atendu pli favorajn cirkonstancojn.

INFORMADO : ĉ. 20 personoj petis informojn kaj ricevis respondon kaj dokumentojn.

FINFINE, mi diras ke ni ne povas projekti grandajn planojn, tial ke niaj monfortoj estas ne sufiĉaj, kaj ni povas prezenti nur tiun sumon de simplaj agadoj.

Niaj geanoj sisteme provas eniri en neesperantistajn mediojn, kiel lernejoj (kursoj kaj prelegoj), religiaj pilgrimoj (Baneux), porpaca movado (MEM), ekspozicioj, elsendoj en radio-centroj liberaj, ktp.

Ni konstatas kaj bedaŭras la stabileeon de la nombro de niaj membroj, ĉar por ke vivu la movado, ni bezonas novulojn por anstataŭigi la maljuniĝantojn.

PROJEKTOJ POR VENONTA JARO : kiel kutime, malfermo de kursoj fare de niaj grupoj. - Prelegoj de D-ro Frank (Virton kaj Erpent). - Radio-elsendoj en Verviers kaj Eupen, cetere en Herstal. Kutimaj renkontiĝoj kaj ekspozicioj.



# VLAAMSE ESPERANTOBOND

# FLANDRA ESPERANTO-LIGO

Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN

## S U P E R R I G A R D O

pri niaj akitvecoj en la periodo inter 01 07 1983 kaj 30 06 1984

Sendube pro la feria periodo, la vera agado komenciĝis per la kongreso en Leuven de la 9-a ĝis la 11-a de septembro 1984.
La kongreso estis interesa kaj sukcesa, tiel el organiza, kiel el enhava vidpunktoj. Ĝin partoprenis 78 personoj diverslingvaj, kaj ne nur el Belgio.

La ĝenerala temo de la kongreso estis "INTERNACIA KOMUNIKADO". Tamen, prelegoj kaj kunsidoj okazis rilate al pluraj temoj, i.a. :

- Internacia Komunikado, gvidata de S-ro Paul Kempeneers
- Kominukado, vidpunkto de minoritata plejmultano - Gvidata de Petro De Smedt
- Gazetara agado - Germain Pirlot
- Eŭropa Komunumo - tradukservo - Angelo Tsirimokos.
- E.E.C. - Anne Tilmont
- Mondlingvaj projektoj - Fernand Roose.

Tre aktive partoprenata estis la seminario pri ĝenerala kaj intergrupa agado.

Okaze de la solena malfermo, festparoladis Willy Kuypers, Parlamenta Kvestoro.

Aliflanke, FEL partoprenis en la oficiala ekspozicio kaj seminario pri komunikado en Bruselo (22.11 - 08.12.1983)

Kreiĝis propra libroservo, kunlabore kun FLEJA, sub la nomo "Libroservo FEL/FLEJA"
Ĉefaj karakterizoj : FEL prizorgas la libroservon ĝenerale, FLEJA tiun ekster la Esperanto -Centro, t.e. okaze de kongresoj kaj similaj renkontiĝoj.

- FEL eldonis intertempe la "Manlibro por aktivuloj - dua parto"-n kaj detektivromanon "Jaĥto verturas for .." de Deck Dorval.

La membronombro denove pli-altiĝis post kelkjara malpliiĝo.

Pri la kadrokursoj nenio nova, depost kiam ni lasis ilian organizon al BEF.

Pri nia partopreno en KLUBO 100 kaj en la jubilea programo, ni supozas ke estos raportate kadre de tiu komisiono.

En novembro 1983 E. Symoens kaj A. Tilmont renkontis en lia hejmo, S-ron W. Kuypers kiu jam en la kongreso en Leuven sin esprimis favore al Esperanto. Nun li promesis serĉi personojn en la kvar grandaj politikaj partioj por formi por-Esperantan kernon en la parlamento.

La eldonejo "De Sikkel" akceptis eldoni en la serio "Historische Verhalen (Historiaj Rakontoj)", uzataj en la bazaj lernejoj, kajeron pri la vivo de Zamenhof, verkitan de R. de Roover.

Je 05 11 83 okazis balo nome de FEL en la salono "Alpheusdal" en Berchem-Antwerpen.

Rilate al plibonigo de intergrupa agado, FEL decidis - kaj jam realigis tion - duobligi la flavajn paĝojn en ESPERANTO PANORAMA, malfermante ilin al la grupoj por publikigi siajn klubajn komunikojn kaj tiel atingi pli grandan publikon.

FEL ankaŭ plusendis ESPERANTO PANORAMA-n al eksmembroj, cele al ebla rekaptado.

La provincaj ĝeneralaj kunvenoj ankaŭ ĉi jare okazis. Ili evidentiĝis esti tre valoraj kontakteblecoj intergrupaj.

En la ĝenerala jarkunsido en marto 1984 elektiĝis nova prezidanto en la persono de Ivo Durwael.
Nova iniciato depost tiam estas jam eldono de "Librovermeto"; monata bulteneto pri novaj eldonoj kaj/au specialaj libro-ofertoj.

Kontraŭ la intenco de la Eŭropaj instancoj eldoni identec-kartojn en la gepatra (regiona) lingvo kaj la angla, FEL protestis. Ĉu nia protesto iel efikis, ni ne scias, sed ŝajnas ke la identeckartoj restos en la gepatra (regiona) ligvo de la portanto.

En la sino de FEL, sed tio okazis samtempe kadre de KLUBO 100, decidiĝis starigi ekzamenkomisionon bazan kaj mezgradan. Ni petis al UEA krei diplomojn aŭ atestilojn. Respondon ni ne ricevis, sed ni jes scias, ke UEA petis al Grafika Centro, Antwerpen presi ilin. Kelkaj ekzempleroj jam estas transigitaj al M. Demonty. Ni ankaŭ petis antaŭsubskribitajn ekzemplerojn de la atestilo, sed ankaŭ al tio ne ricevis respondon, almenaŭ ankoraŭ ne je la verkado de la nuna raporto..

Planoj por la estonto :

Antaŭ ĉio plifirmigi la ligojn kun la lokaj grupoj kaj pliivigligi la ĝeneralan agadon. Ke nia lokaj respondeculoj interesiĝas pri tio, pruvis la multnombra partopreno en nia kolokvo okaze de nia dua kongreso en Aalst, komence de septembro.

JB.



BELGA
ESPERANTO
FERVOJISTA
ASOCIO
BEFA

## JARRAPORTO DE B.E.F.A. 1984

1. ĜENERALA JARKUNVENO

B.E.F.A. havis sian ĝeneralan jarkunvenon kune kun F.E.R.N. (siaj nederlandaj kolegoj) en Overijse (B) la 31an de marto kaj la 1an de aprilo.
Ĝi komencis sabate matene per esperanta gvidata vizito de la Granda Placo de Bruselo.
Post komuna tagmanĝo en la stacidomo de Bruselo Kvartalo Leopoldo, ni vizitis la muzeon pri naturaj sciencoj sub la sperta esperanto-gvidado de Wim De Smet.
Poste ni veturis al "Ter Nood", konferencejo en Overijse.
Vespere, S-ro Heinz Schindler (germana kolego) prelegis kun lumbildoj pri sia vojaĝo en Ĉinio kaj S-ro Hilaire Happy (franca kolego) prezentis du filmojn: - la 35a IFEF-kongreso de Oostende kaj - la 25a Internacia Skisemajno de la Esperantistaj Fervojistoj en Maria Alm (A).
Por fini, dancado.
Dimanĉe, antaŭtagmeze okazis la apartaj jarkunvenoj de F.E.R.N. kaj de B.E.F.A.
Post la komuna tagmanĝo, babilado, kaftrinkado kaj rehejmiĝo.

2. LA 36a I.F.E.F.-KONGRESO EN SLANĈEV BRJAG (BG) - 12/18.05.84.

902 kongresanoj el 23 landoj. 15 BEFA-anoj partoprenis.
En la solena inaŭguro salutis i.a.:
- S-ro Vasil Canov, la bulgara ministro por transporto;
- S-ro Petâr Todorov, U.E.A. estrarano;
- S-ro Mio Petek, viceministro de la transporto en Kroatio (YU) nome de F.I.S.A.I.C. (Internacia Federacio de la Artaj kaj Intelektaj Asocioj de Fervojistoj).
Menciinde estas la ĉeesto de S-ro Stoil Ferdov, la ĝenerala direktoro de la Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj.
Labor-kunsidoj, fakaj prelego kaj diverslandaj aktualaĵoj, tri ekskursoj, folklora, teatra, muzika, bala vesperoj, ktp. kontribuis al la sukceso de la kongreso.

3. B.E.F.A. ankaŭ partoprenis:
   3.1. la printempan tutsemajnan aranĝon de F.F.E.A. (la francaj kolegoj) en St Raphaël, fine de aprilo;
   3.2. la tutsemajnan aranĝon de F.F.E.A. okaze de ĝia ĝenerala jarkunveno en St Malo, en septembro;
   3.3. la ĝeneralan jarkunvenon de G.E.F.A. (la germanaj kolegoj) en Mönchengladbach, en oktobro;
   3.4. la F.E.L.-ĝeneralan jarkunvenon en Aalst, en septembro.

4. B.E.F.A. kunlaboris en la interkongresa Terminara Komisiono de Parizo 16 + 17 + 18.03.84;

5. B.E.F.A.-Prezidanto, kiel ĉefkomitatano de I.F.E.F. partoprenis la I.F.E.F.-estrarkunvenojn de Vejle (DK), 09/10.03 kaj de Lübeck (D) 29/30.09.

6. B.E.F.A. daŭrigis siajn per korespondaj Esperanto-kursojn kaj ekde decembro redonos buŝajn Esperanto-kursojn 2 sabatoj po monato.

Kompilis,
La B.E.F.A.-Prezidanto,

Lucien DE SUTTER.

Universala Esperanto-Asocio

en konsultaj rilatoj kun Unesko

akker
telenstraat 231
2 EG Amsterdam.

Amsterdam, 22-9-84

Kara redaktoro,

Mi afable petas vin meti du anoncetojn por korespondado kun Afrikanoj en via gazeto.
Mi anticipe kore dankas vin por tiu via helpo, kiu servos al plifirmigo de la rilatoj kun niaj novaj, malproksimaj lernantoj en Afriko.
Por via informo mi aldonas ĝeneralajn konsilojn por tiuj kiuj korespondas kun Afrikanoj; ne por laŭvorta publikigo, sed eble por aldona komenteto aŭ konsilo.

Samideane via,

H Bakker.

FOLEY A. Ekué, B.P.13528, Lomé-Nyekonakpoe, estas juna Togolandano, kiu entuziasme lernas Esperanton, kaj atingis bazan lingvoscion (ne perfektan). Li laboras en elektronika laborejo kaj vespere studas por radio-tv-teknikisto. Li deziras korespondi pri sia fako, kaj se eble per tio havi kelkajn fakajn dokumentojn kaj materialojn (donace..!).

BIAG EKANGA 1-er, s/c M. BELL Jacques, B.P.1323, Douala, Kamerunio, atingis bazan scion pri Esperanto, kaj nun volas havi (pli da) korespondantoj, precipe el Nederlando, Belgujo kaj Svisujo. Li estas lernanto ĉ. 20-jara (aŭ eble jam finis la lernejon).

Ĝenerale:

iel kunlaboranto de UEA pri Afriko, mi ofte ricevas petojn de Afrikanoj kiuj tre eziras rilati kun homoj en aliaj kontinentoj. La korespondado estas por ili la sola aniero por havi kontaktojn kun aliaj esperantistoj, kaj tre gravas fidela, ofta, mika skribado. La poŝto estas tiel malakurata, ke daŭras monatojn ĝis venas res-ondo, kaj ne malofte la leteroj tute perdiĝas. Tial oni devas konservi kopiojn de iaj leteroj, kaj fari fotokopion por denova sendo, se iu letero perdiĝis.
a afrikaj lernantoj, izolitaj, lernantaj nur perkoresponde, ne havas facilan vojon or lerni la lingvon. Tial ilia lingvaĵo ofte estas neperfekta. Vi povas, se [illegible]ile aj stimule (ne kritike), helpi en la plibonigo de la lingvo-uzo. Kaj skribu [illegible]en senerara, simpla, klara Esperanto. Malfacilajn vortojn traduku, aŭ eĉ donu tutan radukon de via letero en angla aŭ franca lingvo, se la korespondanto estas ankoraŭ omencanto.
e ekestas kontakto, mi volonte ricevos informon pri la evoluo de tiu kontakto. ur tiel mi povas ĝisdatigi mian administracion, kiu servas por konduki la afrikajn ernantojn kaj subteni ilin kiel eble plej trafe.



NACIAJ KAJ INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

1984.

| | |
|---|---|
| 15-12 | Zamenhof-Festo - Bruselo B - vizitoj, kabaredo... |
| | Solena Malfermo de Esperanto-Tur Oficejo - Bruselo B |
| 15.12 | Festpremiado de Poezia Konkurso "Internacia Amikeco" Trieste I - prelegoj, vizitoj... |
| 22.12-06.01 | Jarfina Esperanto-karuselvojaĝo el Bruselo - Bydgoszcz PL - Budapesto H - vizitoj, ekskursoj.. |
| 27.12-03.01 | 28a Internacia Seminario de GEJ kaj GEA -Wetzlar D prelegoj, popoldancoj, klerigaj aktivecoj |
| 29.12-02.01 | Novjara Internacia Renkontiĝo - Pisanica BG |

1985

| | |
|---|---|
| 12-25.01 | Internacia Vintra Esperanto-Feriado - Zakopane PL - kursoj, konkursoj, ekskursoj, spektakloj, dancoj... |
| 24.01-17.02 | Internacia Kurso-Karavano por Esp.-Vojaĝgvidantoj - Londono, Bruselo, al Bydgoszcz PL - prelegoj, ekskursoj.. |
| Tutjare | Esperanto-staĝoj - la Chaux-de-Fonds CH |
| | Konstanta Internacia E-Lernejo - Bydgoszcz PL - kursoj, vizitoj, ekskursoj |
| | Internacia Esperanto-Kursejo - Pisanica BG - edukaj, klerigaj aktivecoj, prelegoj, kantadoj, aŭdvidaj arangoj, filmoj, spektakloj, dancadoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj, studaj vojaĝoj |

??????????????????????????????????????????????????????????????????

SANO - kvaronjara cirkulero de medicinistoj, farmaciistoj, geflegistoj, rugkrucanoj kaj de tiuj kiujn interesas medicino.
Eldonas: CEHA ESPERANTO ASOCIO, Jilskà 10. 110 00 PRAHA 1? CSSR.

ANONCETO

"D-o P. Denoël estus tre danka al samidean(in)o kiu informus lin (rue Victor Raskin 20 - 4000 LIEGE) pri la ekzisto de videokasedo kun la TV-filmeto farita okaze de la malfermo de la Ateliero de Esperanto en Aubel (septembro 1981)."

------------------- Novaĵoj el Welkenraedt -------------------

[illegible]om la kursoj por infanoj kaj por plenkreskuloj, la klubo de Welkenraedt okazigis en novembro:

- la 5an, revenante de la junulara renkontiĝo en De Pinte, du jugoslavaninoj prezentis lumbildojn kaj prelegis pri sia lando
- la 10an, Vilĉjo Valdono, ĉeroka indiano, klarigis la silabaron de sia gepatra lingvo.

Ni dankas la kursanojn kaj la esperantistojn de la najbaraj kluboj pro ilia afabla partopreno.

Marie Grela.

## KULTURDOMO DE FRANCLANDAJ ESPERANTISTOJ

sendis al BEF la programon de la KULTURAJ ARANĜOJ 1985, kiuj okazos en la Esperanto-Domo Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé.

| | |
|---|---|
| Internacia Renkonto de Infanoj | 31.03-06.04 |
| Neformala Internacia Renkonto | 16.06-30.06 |
| Prelegoj kaj Kursoj | 30.06-21.07 |
| Kursoj | 22.07-11.08 |
| Informatiko per kaj por Esperanto | 11.08-24.08 |
| Renkonto de blindaj kaj ne-blindaj Esperantistoj | 18.08-01.09 |

Informiloj ĉe BEF kontraŭ postmarko aŭ respondkupono.

---

SKRIBU !!!

Multajn korespond-petojn ricevas BEF: multajn adresojn el ĉiuj kontinentoj posedas BEF. Petu kaj vi ricevos !

### Deziras korespondi !

14-jara knabino d. k. kun belgaj gejunuloj; komenc. int. literaturo, sportoj, divers...
Joo' Tünde, Bakonszeg, Sallai u. 15, H 4164 Hungario.

Studento inter. muziko, foto, vojaĝo... d. k. kun geknaboj el B. Atendas respondon kun foto. N'Guessan Youébalé Camille, Faculté de Droit BP V 179, Université d'Abidjan, Côte d'Ivoire.

14-jara v. k. kun belga knabo aŭ knabino.
Eyczba Alexander, Bp. Kaszásdülö u. 3. VIII./74, 1031 Hungario.

Helpu doktoriĝi! Mi prep. disert. "Interlingvistikaj konceptoj ekde 1945", bez. ajnajn interl. periodaĵojn, artikolojn, librojn, lingvoprojektojn k. informojn. Rekompencon laŭ interkonsento: Aleksandro Melnikov, a.ja.393, SU 34.4007 Rostov -DON Sovetunio.

D.k. kun belgaj gejunuloj: 21 j. lernas prep. inst. profesoreco. Adr. Eva Kalamàr, Nagykanisza, Karkecz u. 3, 8800 Hungario.

23-jara stud. Univ., hobioj: lingvoj, libroj, vojaĝoj v. amikiĝi F-ino Jola Kvuk, ul. Nowodworska 25/16, 85-120 BYDGOSZCZ, POLSKA.

V.k. kun belga knabo aŭ knabino: hung. knabino n. 1968, lern. en lingva gimn. ŝatas legi, aŭskulti muzikon, inter. sciencoj, homoj Kupi Ildikò, Vasvàr, Marx k.u. 1/c II.7, 9800 HUNGARIO.

V.k. kun geknaboj: 15 j. knabino ŝatas danci, aŭdi muzikon, legi. Judit Szépfalvi, 9700 SZOMBATHELY, PATAKI I.U. 23, HUNGARY.

&&&&&&&&&&&&&&&&

### Monda Turismo

La (lastan kongresan) kunvenon de Monda Turismo prezidis Leo De Bruyne (Belgio) kaj Andrzej Grzebowski (Pollando)... L. De Bruyne anoncis ke la M.T. baldaŭ fariĝos belga asocio sen profita celo kun la sidejo ĉe Montoyerstr. 37 en Bruselo (kune kun E.E.C...)